

Esperanto en Skotlando

*Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba
Printempo 2011 - £2/€2.50*



La plej alta kongresonumero en Esperantio!

**La 106a Skota Kongreso de Esperanto
estos en la Kings Arms Hotel, Lockerbie
10.-13. de junio 2011**

Aliĝilo: p. 42-43

Esperanto en Skotlando

Numero 198 – Printempo 2011 – ISSN 0014-0643

Redaktoro: Ed Robertson

Redakcia adreso: 52 Easter Drylaw
View, Edinburgh, EH4 2QP

Administranto: Mia Casey

Telefono: 0131 332 9803

Rete: ed-robertson@telesvet.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de *Esperanto en Skotlando*: 14a de aprilo 2011. Oni prefere sendu kontribuojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer (senpage havebla de la koncerna retejo). Dokumentoj en la formato Microsoft Word ankaŭ estos akceptataj. *Esperanto en Skotlando* uzas la tiparon Gentium, kiu subtenas kaj la tradiciajn esperantajn diakritojn kaj tiujn de ĉiu alia latalfabela skribsistemo (vizitu <http://scripts.sil.org/Gentium> por deŝuti la tiparon). Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj. *Esperanto en Skotlando* aperas dufoje en la jaro.

Enhavo

David KELSO: <i>Ordinara Ulo</i> - <i>novelo</i>	4
Garbhan MacAOIDH: <i>La gaela lingvo</i> – prelego farita dum la 103a SKE	9
Garbhan MacAOIDH: <i>William Auld, poeto nekonata en sia lando</i>	13
Jack CASEY: <i>Trajnoj, busoj, kvizoj kaj dramoj</i> – Aŭtuna Studrondo 2009	15
Garbhan MacAOIDH: <i>Poezio en Esperanto</i>	19
Jakvo SCHRAM: <i>Mirinda Travivaĵo</i> - La 105a Skota Kongreso de Esperanto	21
El la redakcia rubujo	25
David KELSO: <i>Leteroj el fora Lando</i>	27
Shey BISHNOI: <i>“Je nia Stano!”</i> - Dundee 2009	33
Hju RID: <i>Venĝo dolĉas</i>	35
Gary MICKLE: <i>La “internaj ideoj” de Esperanto</i>	38
Kalendaro de venontaj eventoj: 106a SKE Lockerbie 2011 ktp	42

La opinioj esprimitaj en *Esperanto en Skotlando* ne nepre kongruas kun tiuj de *Esperanto en Skotlando* aŭ EAS. *Esperanto en Skotlando* estas publikaĵo de la

Esperanto-Asocio de Skotlando

Prezidanto: Garban MacAoidh

Vic-Prezidanto: Hugh Reid

Sekretario: David Bisset

Kasisto: David Hannah

Adreso: 47 Airbles Crescent,
Motherwell, ML1 3AP.

Telefono: 01698 263 199

Rete: secretary@skotlando.org

El katedro



Redaktora Komento

Pardonpeto

Ni pardonpetas pri la prokrasto de ĉi tiu numero de *Esperanto en Skotlando*. La publikado de nia revuo revenas ekde nun al la antaŭa ritmo. Necesis, do, inkluzivi en ĉi tiu numero pli altan ol normalan proporcion de raportoj pri pasintaj eventoj de la skota Esperanto-movado. Sed ni esperas, ke nun sciiĝinte la ĝuindeccon de la etoso ĉe niaj kunvenoj kaj kongresoj tio instigos al vi aliĝi kaj ĉeesti precipe se vi ankoraŭ ne partoprenis. Novaĵoj kaj informoj pri nia 106a kongreso en junio 2011 troveblas en paĝoj 42-43, aŭ en nia retejo. Vi povas aldone indiki vian intereson pri la kongreso en **Facebook**: <http://www.facebook.com/home.php?#!/event.php?eid=164961730198734>

Tamen, aliaj temoj ne neglektiĝis en nia nuna numero: poezio, humuro, noveleto, lingvoj, arĥitekturo, kaj kontribuo de Gary Mickle al nia daŭra debato pri nacieco, politiko kaj la interna ideo implicita en nia internacia lingvo.

David Kelso

Nia helpredaktoro David Kelso, antaŭa prezidanto de EAS kaj sekretario de Esperanto-Asocio de Britio raportigis kiel mankanta de sia dumvintra hejmo en Kalabrio, suda Italio la 16an de novembro 2010. Najbaroj en lia vilaĝo San Pantaleo di San Lorenzo vidis lin la antaŭan tagon, ekpromenantan en la belegan apudan pejzaĝon kiun li bone konis kaj amis. Grandaj serĉadoj entrepreniĝis de teamoj de karabinieroj, fajrobrigadistoj, arbargardistoj, financpolicistoj kaj volontuloj, kun helpo de helikopteroj, kaj unuoj de flarhundoj kaj specialaj montarsavistoj de aliaj partoj de Italio dum pli ol semajno, sed finfine senrezulte. David, emeritiĝinta inspektoro de supera edukado en Skotlando, estis bone konata ne nur en Britio kaj Italio sed de multaj homoj en aliaj mondopartoj, kaj niaj pensoj estas kun liaj familio kaj proksimumoj. Ni povas kaj devas esperi pri feliĉa konkludo al ĉi tiu malfeliĉa sagao, sed kun la paso de tempo, ni devas konstati, ke la ŝancoj pri tio fariĝas malpli verŝajnaj. Povas esti, ke ni devos en iu estonta eldono celebri la vivon de vera bonulo tro frue prenita de inter ni. Ĉi tiu numero de *Esperanto en Skotlando*, tamen, inkluzivas novelon lian, kaj du raportojn de lia amata *Fora Lando*.

Ordinara ulo

Jan sidas ĉe skribotablo, rigardante komputilon. Ne precize *rigardante* tamen; pli *spektante*, ĉar li ne vere legas la ciferojn kiuj montriĝas ĉe la ekrano. Li pensadas pri la vespero. Marde okazas la ĉiusemajna kunveno de la loka Esperanto-klubo, signifa evento en la senokaza vivo de Jan Planko. Unu vesperon en la semajno li liberiĝas de la duopa tiranado de laboro kaj familio. Neniu kolego, neniu parenco membras en la klubo; tial li povas vivi alian vivon, privatan vivon.

Iom surprize, Jan ja havas privatan vivon, mensan vivon. Li ŝajnas esti tute ordinara ulo. Ĉiam tia. En la lernejo oni ofte forĝesis lin: li estis 'unu el la ceteraj'. Meze inteligenta, meze belaspekta, meze diligenta, li neniam elstaris. Neniu, nek gepatroj, nek amikoj, nek kolegoj sciis ke Jan vivas en alia mondo, imaga mondo kiu ĉiel pli belas, pli interesas ol la reala. Li ne sufiĉe sukcesis en la lernejo por progresi al altlernejo; post du-tri hazardaj okupoj li trovis postenon ĉe la municipo kiu tute taŭgis. Kondiĉe ke li ĉeestu regule kaj laboru meze diligente, oni lasis lin revii. Post dudek jaroj li atingis mez-altan gradon de Supera Aktisto en la Fako pri Loĝigo. Li kontentis.

La edzino, Marja, tamen, tute ne. Ŝi renkontis Jan kiam ankaŭ ŝi dungatis ĉe la municipo. Verdire, ŝi ne tiom alte apreziis lin, sed ŝi havis jam dudek kvin jarojn, ŝi estis nur meze belaspekta, ŝi jam unufoje fuŝfianĉiĝis kaj, nu ŝi gravedis. Tre eble estis Jan la patro, sed kiel certi? Tamen ŝi certigis al li ke ja estis li. Kiam li demandis "Kion do fari?", ŝi respondis "Jes, tio estus plej bone, sed kiel eble plej baldaŭ." Jan akceptis, tiam kaj daŭre dum dek kvin jaroj. Marja tamen ja ne estas ordinara ulo. Unue, ŝi ambicias, kaj pri havaĵoj kaj socie; due, ŝi multe ĝuas seksumi, bedaŭrinde iom pli ol Jan; trie kaj plej grave, ŝi ne estas rezignema. Kion ŝi deziras, ŝi ĉasas.

Ĉion tion komprenas Jan, mezklare. Sed li kutimiĝis al mondo plena je problemoj kiujn li ne kapablas solvi, ĉu ĉe laboro, ĉu hejme, ĉu socie. Tial li vivas pli en la plibela imagomondo ol en la problemoplena reala mondo: ekzemple, tiun mardon posttagmeze, antaŭ la komputilo, revanta pri la klubkunveno. Tuthazarde Jan estas trovinta la magian mondon Esperantio. Kelkajn jarojn antaŭe, lia edzino senpacienciĝis pri lia

konstanta estado en la domo vespere. “Pro kompato, Jan! Ĉu vi ne povas trovi ion farindan, anstataŭ ol stagni ĉiam antaŭ la televidilo? Vidu, en la loka ĵurnalo, la loka ĥoro serĉas virojn. Vi estas preskaŭ viro. Kial ne provi?” Iom senentuziasme, sed por eviti la edzinan furiozon, Jan elserĉis la ĥoron kaj proponis sin. Post provo, oni decidis ke lia voĉo estis baritona, mezkvalita, kaj lokigis lin en la malantaŭa vico da baritonoj. Dum unu jaro li partoprenis la ĉiusemajnajn ekzercojn kaj tiel eskapis la ĉeĥejman koleron. Li meze ĝuis la aferon, precipe la viziton al loka drinkejo post la ekzercado. Kiam okazis, post kelkaj monatoj, 'Kluba Foiro' en la urbodomo, la sekretario petis al Jan deĵori ĉe la budo de la ĥoro. Senentuziasme sed bonvole, Jan jesis. Eventuale, estis pli da helpantoj ol helpatoj do Jan forvagis, esplorante la foiron.

Hazarde, li renkontis najbarinon sian, Varva, kiu deĵoris ĉe alia budo. La vero estas ke jam dum multa tempo Varva okupis specialan lokon en la fantazia mondo de Jan. Ne aparte bela, ŝi tamen estis ja pli simpatia ol Marja kaj ĉiam ridetis renkontante Jan. Ĉe la foiro, do, ŝi varme salutis lin kaj ekbabilis. “Kion do faras vi ĉi tie?” demandis Jan, pensante ke eble ŝi serĉas flankokupon, kiukaze ili kune serĉu. “Mi? Ho, mi helpas ĉe la budo de la Esperanto-klubo. Ĉu interesas?” “La kio-klubo?” Ŝi tiam klarigis kio estas Esperanto kaj kion faras la klubo. “Fakte,” ŝi diris, “venontan sabaton ni okazigos senpagan unutagan 'Enkondukon al Esperanto' - kun bongusta bufedo!” “Ho, ĉu?” spiris Jan, “kaj ĉu vi rolos en tiu evento?” “Plej certe. Mi respondecas pri la akcepto kaj la manĝaranĝoj.” La ideo de tuta sabato en la kunesto de Varva, for de Marja, sufiĉe allogis Jan, do li aliĝis al la unutaga kurso. Tiel komenciĝis la esperanta vivo de Jan Planko.

Eventuale, li ĝuis la kurseton, precipe kiam Varva invitis lin helpi ŝin poste ordigi la ĉambron kaj akompani ŝin hejmen. Li tial ne hezitis, kun dek kvin aliaj, registri sin en dek-semajnan, senpagan kurson, samvesperan ol la klubkunveno, kiam Varva organizas kafon kaj biskvitojn. Iom surprize, Jan ete sukcesis: por li la lingvo estis kvazaŭ ludilo kiun li povis priludi laŭvole. Post dek semajnoj, li kun sep aliaj kiuj finis la kurson aliĝis al la klubo kaj al la 'Ĝenerala' klaso en kiu, ŝajnis al Jan, partoprenis la plimulto de la membraro. Li ankaŭ iĝis neoficiala asistanto al Varva pri kafo, biskvitoj kaj hejmenakompanado. Pasis monatoj, jaroj, kaj Jan bone progresis, al la 'Stela' klaso en kiu membris ankaŭ Varva.

Hodiaŭ, spektante la ekranajn ciferojn, Jan pripensas la ĉi-vesperan kunvenon. Antaŭ unu monato okazis ĉiujara konkurso en la klubo, por la 'steluloj', membroj de la 'Stela' klaso. Oni devis verki poemon, teatraĵeton, eseon aŭ noveleton, longan ne pli ol 2000 vortojn. La juĝistoj estas venkintoj el pasintaj jaroj, kiuj ne rajtas partopreni. La premio: kvintaga staĝo ĉe la Kastelo Grezijono en Francio, staĝo pri 'Originala verkado en Esperanto'. Jam dum tuta jaro, Jan preparis sin, per multaj noveloj, ĉiuj ĉerpitaj el lia riĉega fantazia mondo. Fine li decidis prezenti unu el la plej lastaj, 'Venĝo, revenĝo" kiu temis pri horora murdo en trankvila burĝa kvartalo. Li opinias ke Varva ne rekonos sin en la intrigo. Varva, li scias, prezentis beletan poemon pri 'Amo sen eĥo'.

“Hej, Jan ! - Ĉu vi intencas manĝi tion aŭ ne?” kridemandas la kareta Marja, vakigante la tablon post la vespermanĝo. “Ne, kara. Pardonu min, mi estis en alia loko.” “Kiel kutime. Ĉu vi iros al tiu stulta sparta klubo via, nu?” Ĉiusemajne la sama, febla ŝerco. Ŝi ne komprenas kio estas Esperanto (nek Sparto, plej eble), nek interesiĝas. “Jes, kara. Ĉi-vespere oni anoncos la venkinton en la konkurso.” “Konkurso? Ho jes, vi iam menciis tion. Kia la premio?” “Kvintaga vizito al Kastelo Grezijono en Francio.” “Nu, bonan ŝancon. Mi ŝatas la francajn kastelojn.” “Temas pri kvintaga staĝo, kara, ne ferio - kaj por nur unu persono. Tamen, mi supozas ke vi povus ankaŭ veni, kaj viziti la kastelojn de la valo Lŭar. Tre malprobablas ke mi venkos, tamen, do”. “Hmf! Jan Planko, verkisto! - kaj mi estu reĝino!”

Survoje al la kunveno, Jan renkontas Varva, kiu ŝajnas nekarakterize malgaja. “Ĉu io misas, Varva?” “Ne gravas, Jan. Mi kvereletis kun Derk pri tiu konkurso. Li diris ke se mi venkos mi devos cedi ĉar li volas ke mi akompanu lin kun iuj kolegoj kaj iliaj partneroj al vilao en Hispanio.” “Strange, mi havis similan kontraŭadon kun Marja. Tamen ni interkonsentis ke mi certe ne venkos.” “Ne certas mi, Jan - tio estis bonega noveleto. Mi preskaŭ rekonis nian kvartalon!” Dum la klaso neniu sukcesas koncentriĝi pri problemoj de vortordo; ĉiu pripensas la konkurson, kies rezultojn oni anoncos dum la kafpaŭzo.

“Geamikoj,” deklamas la klubprezidanto, kiu estas ankaŭ juĝinto, “silenton mi petas. Mi scias ke ĉiuj soifas scii la rezultojn de nia ĉiujara konkurso pri originalaj verkoj de klubanoj. Ĉi-jare, mi ĝojas anonci ke ni decidis aljuĝi du premiojn, pro la kvalito de la verkoj kaj ĉar pasintjare ne eblis pripromiti la premion. Kaj la du premiitoj estas perfekte ekvilibrigaj: unu estas longatempa membro de la klubo, la alia relative lastatempa;

unu estas ina, unu vira; unu konkuras la duan fojon, la alia estas novulo; unu prezentis poezion, la alia prozaĵon.” Li hezitis, ĉiuj ridetis pro la intenca suspensigo

“Mi plej varme gratulas al Varva kaj al Jan !” Ĉiuj aplaŭdas kaj batgratulas la venkintojn, precipe al Jan kiu la unuan fojon partoprenis la konkurson, estinte klubano nur kvar jarojn. “Ho, debuta bonŝanco,” diris Jan, kvazaŭmodeste. “Mi opinias ke ne, Jan,” diris alia juĝinto. “ Vi havas la imagopovon de vera verkisto. Vi nepre plu verku. Parenteze, ni volas eldoni volumeton da premiitoj el la kvin jaroj de kiam startis la konkurso. Konsentite, ĉu ?” Jan gape jesas. Neniam en la vivo li gajnis premion, nek en la lernejo, nek en sporto. Nun, tutsubite premiita kaj eldonota. Marja ne kredos.

Marja ja ne kredas; pli ĝuste, ŝi ne volas kredi. Jan, premiito kaj eldonota? Ne eblas. “Kaj ĉu vi atendas ke mi nepre akompanu vin?” “Laŭvole, kara. Se plaĉus viziti la kastelojn de la Lŭaro, kial ne?” Silentado.

Ĉe la laborejo Jan diras nenion ĉar la kolegoj scias nenion pri Esperanto, pri la klubo, pri la fantazia mondo de Jan, sed li aranĝas siajn feridatojn por kovri la semajnon ĉe Grezijono. Dum la semajnfino Marja, kiu strange silentas kaj malagresas al Jan, anoncas ke ŝi ne certas ĉu ŝi volas akompani lin al Francio. Jan ne multe interesiĝas; li pensas pli pri kion faros Varva.

La postan mardon, Jan demandas al Varva kion diris Derk pri la premio, pri la vizito al Francio. “Nu, li diris ke ne eblas, ke mi devos akompani lin. Kompreneble mi protestis. Kial li ne akompanu *min* ? Gajnis mi premion, ne li. Mi bedaŭras diri, ke ni kverelis - sufiĉe ofta okazo dum lastaj monatoj - kaj ne interparolis dum pluraj tagoj. Tamen hieraŭ mi demandis ĉu li pli pensis pri la afero ĉar mi devas fari aranĝojn se mi intencas iri. Se mi bone aŭdis, li grumblis ke eble io eblas.” “Ho, strange. Marja diris ion similan.”

Pasas semajnoj. Ĉiumarde, Jan kaj Varva diskutas respektivajn aranĝojn kaj fine decidas ke estus bone iri aŭtomobile, por vidi la francan kamparon. Se ili povos solvi la 'geedzan problemon', kial ne eĉ viziti Kvinpetalon revoje? Tuj post la semajno en Grezijono okazos tritaga staĝo ĉe Kvinpetalo pri 'Pintaj aŭtoroj el jarcento da Esperanto'. Interese. “Varva,” diras Jan iom hezite, "se Derk ne akompanos vin, ĉu vi ŝatus akompani min, ĉar ŝajne Marja ne? Estus iom nekutime sed ni estas bonaj

geamikoj, plenaĝuloj kaj ŝajne, intertempe kvazaŭ-fraŭloj!” Varva ridas, “Ho, Jan, kia petolaĵo! - 'Kara Derk, ne ĝenu vin pri la somero. Jan solvis la problemon' !” Ambaŭ silentas. Post pluraj minutoj, “Fakte, Jan, tio tre plaĉus al mi. Ni vidu kio eblos.”

La sekvan semajnfino, Jan denove levas la temon ĉe Marja. “Kara, ĉu vi ja ne volas akompani min al Francio?” “Ne, dankon, mi havas aliajn planojn.” “Ho nu, ĉu ĝenu vin se akompanus min Varva? Ŝajne Derk ne volas iri.”

Marja fikse rigardas Jan. “Jan, ĉu vi diras ke vi volas ferii en Francio kun Varva?” “Nu ne, jes, tio estas, temas pri akompani nur. Se ni ambaŭ iros al Grezijono, estus pli logike iri kune ol dise, ĉu ne?” “Ho jes, tute logike.” “Do, neni problema?” “Ne.” “Bonege, do. Dankon. Kaj kio pri via ferio? Ĉu vi decidis kion fari?”

“Jes, Jan. Mi ferios en suda Hispanio, kun Derk.” “Kun Derk? Sed vi apenaŭ konas lin! Kiel eblas?”

“Idioto ! Dum vi fantazias en Spartolando dum tiuj kvar jaroj, kiel vi supozas ke mi pasigis ĉiun mardovesperon?”

David KELTSO

🏰 **Ĉu vi vidis nian TTT-ejon?** 🏰

Por la plej lastaj novaĵoj pri Esperanto
en Skotlando kaj ĉirkaŭ la mondo

Direktu vian krozilon al:

<http://www.skotlando.org>

La gaela lingvo

Prelego farita dum la 103^a Skota Esperanto-Kongreso,
Inverness, 2008.

Por ni Esperantistoj, Esperanto estas bela kaj amata lingvo. Por mi, tamen, la gaela estas la plej bela el ĉiuj lingvoj. Por aprezi ĝian belecon, aŭskultu la unuan strofon de konata gaela kanto:

*Nan robh mise 's mo ribhinn choibhneil
Anns a' ghleann far an goir an smeòrach
Eòin air gheugan 's iad seinn le aoibhneas
'S a' ghrian a' soillseadh gu boillsgeach, bòidheach.*

Se estus mi kaj l' knabin' ĝentila
En la val' kie kovas turdo,
Birdaro gaje sur branĉ' kantanta,
Kaj l' suno bela kaj helbrilanta.

Pli ol iu ajn alia lingvo, la gaela elvokas la pejzaĝon kaj spiriton de Skotlando: la altajn malvarmajn montojn, grandajn lagojn kaj fjordojn, sennombrajn insulojn. La gaela estas samtempe virece forta kaj inece tenera. Pro tio, poezio kaj poetoj ĉiam abundis en gaelparolanta Skotlando.

Laŭ onklo mia, miaj antaŭuloj devenis de la regiono de la rivervalo Strath Naver (gaela prononco: "stranuer") en Sutherlandshire, kie oni unue intencis okazigi ĉi tiun kongreson. La gaela nomo de tiu regiono estas *Dùthaich 'ic Aoidh*, kiu signifas la lando de la klando Mackay". De tie miaj klananoj estis elpelitaj de la uzurpantaj terposedantoj, kiuj avidis tiun vastan teritorion por bredi ŝafojn, ĉar tio estis pli profitdonaj ol la lupago de malriĉaj hubuloj ("crofters").

Pri la skotgaela, la irlanda aŭtoro Aodh de Blácam skribas jene, en sia verko *Gaelic Literature Surveyed*:

"La gaela eniris Skotlandon kiel la lingvo de irlandaj koloniantoj en (la regiono) kiu nun nomiĝas graflando Argyll ... La skota gaela ĉiam enhavis

dialektajn variantojn kompare kun la irlanda, sed ĝis la deksepa jarcento, irlandaj, skotaj kaj manksaj kleruloj subtenis inter si seninterrompajn rilatojn pere de komuna normigita literatura irlanda lingvo. Dum la 18a kaj 19a jarcentoj, la skotgaela disvolvis propran regionan literaturon.”

Se vi demandas, kio estas la gaela, certe multaj skotoj respondus, “Ĝi estas lingvo parolata nur en foraj regionoj de la Skota Altlando kaj sur la Okcidentaj Insuloj. Sed ne tiom da homoj eble scias, ke iam ĝi estis parolata en preskaŭ tuta Skotlando, krom la sudoriento inter Edinburgo kaj la landlimo kun Anglio. Antaŭ nelonge ĝi estis parolata eĉ en la plej orienta parto de Sutherland (*Cataibh* en la gaela). La antaŭa preskaŭ tutskotlanda ĉeesto de la gaela estas facile konstatebla se oni rigardas la mapon de Skotlando. Ekzemple, ĉiu nomo kun la prefikso *Bal-* estas gaela kaj signifas “urbo”. Ĉie, krom en ekstrema sudoriento, vi trovos gaelajn loknomojn. Eĉ tre proksime al Edinburgo – tiu supozeble negaela urbo – troviĝas Balerno, rekonebla gaela nomo. En sudokcidenta Skotlando gaelaj loknomoj etendas preskaŭ ĝis la Solway-fjordo - nomoj kiel Ballantrae, Stranraer, Drummorie, ktp. Fakte, estas multege pli da gaelaj urbaj kaj vilaĝaj nomoj en la sudo ol en la gaelaj insuloj. Laŭ mencio en la libro *The Carrick Covenanters* de James Crichton, la lasta loko en la sudo kie la gaela estis ankoraŭ parolata estis la vilaĝo Barr sur la rivero Stinchar en graflando Ayr. Barr situas nur kelkajn mejlojn oriente de Girvan – alia gaela loknomo – sed iam ĝi estis rigardata kiel unu el la malpli atingeblaj vilaĝoj en suda Skotlando.

LA LINGVO

Komuna al ĉiuj keltaj lingvoj estas la unika, kaj (por nekeltoj) stranga fenomeno, kiu nomiĝas *mutacio*. Temas pri metamorfozo de la unua konsonanto de vortoj aŭ vorteroj laŭ genro, tempo, kazo aŭ sintakso; pro belsoneco, prononcebleco, aŭ eĉ pro nura arbitro (sed ĉiam inter certaj gramatikaj kaj tradiciaj limoj). Preskaŭ iu ajn parol-elemento, kiu komenciĝas per konsonanto, povas suferi mutacion. La irlanda, kaj eĉ pli, la kimra sistemoj de mutacio estas ege komplikaj, sed la skota ĝenerale (sed ne tute) limiĝas - almenaŭ en la skriba formo de la lingvo - al tiel nomata *aspiracio*, kaj estas skribe indikita per aldono, tuj post la “mutaciita” konsonanto, de la litero *h* (ho), kiu estas rigardata en la skotgaela, kiel akcento, ne litero.

Alfabeto

La skotgaela alfabeto enhavas (plus *h*, la mutacia akcento) nur 17 literojn.

Frua historio

Ekde la 6a jarcento p.K., koloniantoj el Irlando hejmiĝis en okcidenta Skotlando, kaj enkondukis sian gaelan lingvon en teritorion, kie antaŭe loĝis la indiĝena pikta popolo. Iom post iom la gaela potenco kreskis, kaj la lingvo disvastiĝis tra preskaŭ tuta Skotlando. Nur la sudorienta regiono apud la limo kun la hodiaŭa Anglio restis ekster influo de la gaeloj kaj la gaela. Eĉ nun, la plimulto da loknomoj en Skotlando estas de rekonebla gaela origino. La koloniantoj el Irlando kunportis siajn tradiciojn: legendojn, proverbojn, rakontojn kaj bardan poezion, kaj tiuj iĝis komuna kultura heredaĵo de la irlandaj gaeloj kaj la skotaj. Tra la jarcentoj, la lingvo parolata en Irlando kaj la dialektoj de la gaeloj en Skotlando iom post iom disiĝis, kvankam ĝis la 18^a jarcento, poetoj en ambaŭ landoj uzis la saman bardan lingvaĵon. Post la fino de la klasika barda periodo, restaĵoj de la antikvaj irlandaj legendoj, epopeoj kaj proverboj iĝis buŝa tradicio, longe recitata, kaj en Irlando kaj en Skotlando.

La gaela en Kanado

En Nova Skotio (Kanado), la gaela lingvo estas ankoraŭ parolata de la posteuloj de skotaj enmigrantoj, kvankam ili ne plu estas tiom multnombraj kiel dum antaŭaj jarcentoj. Ofte, kiam gaeloj el Nova Skotio vizitis Skotlandon, oni miris pri la pli pura formo de ilia lingvaĵo, ne koruptita de modernaj slangaĵoj kaj malbonaj gramatikaĵoj. Oni rekonas apartan novskotian dialekton de la gaela, bazitan sur la formo de la lingva parolita kiam ili forlasis Skotlandon. Diversaj libroj kaj aliaj publikigaĵoj en la gaela estis tie eldonitaj, kaj la poezia tradicio ne tute mortis inter la loĝantoj, precipe sur la insulo Cape Breton (Kabo Bretona). En 1964, la Departemento de la Ŝtata Sekretario de Kanado eldonis kolekton da gaelaj kantoj kun la titolo *Gaelic Songs in Nova Scotia*. Krom tiu libro, mi havas du aliajn kolektojn presitajn en Glasgovo, kiuj konsistas el Poezio el Nova Skotio kaj rakontoj el Nova Skotio.

Esperantaj tradukoj el la skotgaela

Ne multe da skotgaela literaturo troviĝas en esperanta traduko. La verko *Nova Esperanta Krestomatio* inkludas tradukon farita de William Auld de la

poemo *Virin' gaela* originale verkita de Somhairle MacGhill-Eathain (Sorley Maclean). Eble la plej longa skotgaela versio de esperanta verko estas *An Cinneadh Leanabail*, mia traduko de *La infana raso* (http://eo.wikipedia.org/wiki/La_infana_raso) de William Auld, rete eldonita sur la paĝoj de la Esperantlingva verkista asocio. Kiam mi demandis al Máire, mia kara edzino, kion ŝi opinias pri tiu verko de Vilĉjo Auld, ŝi kritike respondis: “Bona verko, sed ĉu ĝi estas sufiĉe bona por esti tradukita en ĉiujn lingvojn en la mondo mi ne certas”.

Krom miaj tri versioj en la gaela, la skota kaj la angla, aperis tradukoj nederlanda, portugala, pola kaj hungara, kaj nuntempe kompletigaĵas pliaj nacilingvaj versioj.

MODERNA GAELA LITERATURO

La gloro de la skotgaela literaturo estas ties poezio. William J. Watson, la kompilinto de la antologio *Bardachd Ghàidhlig* (“Gaela poezio”) skribis: “La moderna gaela poezio, tia, kia ĝi estas al mi konata, komenciĝas ekde proksimume la jaro 1600”. Tamen, ĝis la tragika jakobista ribelo de 1745, ne ekzistis presitaj skotgaelaj libroj, krom kelkaj tradukitaj religiaj verkoj, kaj unu vortaro kompilita de Alexander Macdonald. Post la tiel nomata “pacigo” de la lando, oni komencis eldoni originalajn kaj tradukitajn librojn de diversaj specoj, sed aperis neniu romano – almenaŭ en la moderna senco – ĝis la dudekaj jaroj de la dudeka jarcento. Dum postaj jaroj, kaj precipe post la fino de la dua mondmilito, la moderna gaela literaturo ekfloris. Multe kreskis kaj evoluis preskaŭ ĉiu speco de verkado. Nuntempe, paradokse, malgraŭ la daŭra malkresko de la nombro da denaskaj parolantoj, la konstanta senpopoliĝo de la gaelaj regionoj en Skotlando kaj la malforta situacio de la lingvo en Nova Skotlando (Kanado), ĉiujare aperas pli kaj pli da eldonaĵoj en la gaela lingvo. Tiuj ĉi inkluzivas vortarojn, gramatikojn, lernolibrojn, novelojn, romanojn, historiajn verkojn, poezion, teatraĵojn kaj diversaĵojn (inkluzive de kantoj, muziko, kasedoj, diskoj, ktp.) Eĉ en la tuttera teksaĵo (www), oni trovos abundon da gaela retpaĝoj. Eble la tutmonda teksaĵo estas la plej efika ilo por disvastigo kaj konservado de la gaela kaj de aliaj malfortaj aŭ endanĝerigitaj lingvoj. Kompreneble ankaŭ esperantistoj pli kaj pli profitas de tiu ilo por disvastigi Esperanton.

Garbhan MacAoidh (Girvan McKay)

William Auld, poeto nekonata en sia lando

Je la okazo de la morto en 2006 de nia poeto William Auld, aperis en la brita gazetaro malmulte da nekrologaj artikoloj pri li. Unu menciis la fakton, ke la loĝantoj de Dollar, la eta vilaĝo kie dumjare vivis Auld, tute ne sciis, ke unu el iliaj najbaroj estis la plej renoma poeto en la esperanta lingvo, tri foje nomumita por la Nobel-premio pri literaturo. Mi ĝojis, do, kiam mi konstatis, ke la artikolo pri “Dollar Clackmannanshire” en la angla versio de Wikipedio nun inkludas la nomon de William Auld je la fino de la listo sub la titolo “Notable People” (eminentaj loĝantoj de Dollar).

Mi havas la impreson, tamen, ke eĉ inter la esperantistaro, kiu tiom ofte respekto plene kaj spirretene mencias Vilĉon kiel nian gloran beletriston, malmulte da ili iam legis liajn plej gravajn skribaĵojn – precipe lia ĉefverko *La infana raso*. Ĉi tiu longa poemo estis parte inspirita de la verko *The Cantos* de la usona poeto Ezra Pound. Kiel tiu verko, kaj ankaŭ la fama *Canto General* de la ĉilia Nobel-premiito Pablo Neruda, *La infana raso* temas pri la homo kaj lia situacio en la universo.

Konstatinte pri la forpaso de Auld, iu kontribuanto al skota ĵurnalo bedaŭris, ke oni ne povas legi lian verkaron en la angla. Pro tio mi decidis provi angligi ĝin. Tion mi faris, kaj sendis mian version al anoj de la Esperanto-Asocio de Britio. Ĝenerale, ilia reago estis iom negativa. Ŝajne ili opiniis, ke homo nekonata kiel poeto ne rajtas imiti la “sakran” tekston. Nur unu kritikisto, nome la verkistino s-ino Anna Löwenstein, rete skribis: “Mi ...estis vere imponita pri la alta nivelo de la angla traduko”, dum unu membro de EAB buŝe komentis, ke nur post legado de mia versio, ŝi finfine komprenas la auldan verkon.

Post mia angla versio, mi faris du pliajn tradukojn de la tuta verko: nome, en la skotan kaj en la gaelan. En la sama retaĵo s-ino Löwenstein komentis: “Mi povas imagi ke la skota traduko efektive povus atingi eksteran publikon.”

Mi demandas min, kial okazas, ke tiom grava verko kiel *La infano raso* estas ankoraŭ tiom malmulte konata kaj legata, eĉ inter la esperantistoj kiuj pretendas honori la plej grandan esperantistan poeton de la dudeka jarcento. La malfacileco de la originala poemo estas ege troigita, ĉar en siaj notoj je la fino de la libro, Auld detale klarigas aludojn kaj obskuraĵojn en la teksto.

Oni scias, ke kelkaj eminentaj esperantistoj estis ŝokitaj per la malpruda lingvaĵo en kelkaj sekcioj de la poemo kaj per la kritikoj faritaj de la ateista Auld pri religio kaj klerikismo. Li, tamen, respondas en siaj notoj al tiaj kritikoj. Ĉu tio kontentigas sentivulojn kaj homojn de profundaj religiaj konvinkoj estas alia afero.

Se vi neniam legis *La infana raso*, kuraĝigu vin kaj legu ĝin !

NOTO: Miaj tri tradukoj estas publikigitaj sur la retpaĝoj de la Akademio literatura de Esperanto, www.everk.it. Sed precipe, legu la originalon !

Garbhan MacAoidh (Girvan McKay)



Paul Gubbins kaj Mossley Light railway ĉe la Aŭtuna Studrondo 2009

Trajnoj, busoj, kvizoj kaj dramoj

AŬTUNA STUDRONDO 2009

En la Skota Esperanta Kalendaro estas tri ĉefaj okazaĵoj: La Skota Kongreso en la somero, La Studrondo en la aŭtuno, kaj La Zamenhofa Festo en decembro. La unuaj du havas pli longan historion ol la lasta.

Okazis en Dunblane de la 3a ĝis la 4a Oktobro 2009, alia sukcesa Studrondo. Laŭ onidiroj ĝi povas esti la lasta studrondo ĉe Churches' House (kunsidejo por anoj de diversaj Eklezioj) en Dunblane, beleta urbeto ne for de Stirlinga Kastelo, la iama loĝejo de Skotaj Reĝoj. La grumblado rilatas al la kunsidejo kaj ne al la Studrondo mem. Lasante flanke la plendojn la loko mem estas favora al veturantoj de tri grandaj urboj kie troviĝas esperantaj grupoj. Pro ĝia najbareco al Dollar, kie Bill Auld loĝis, la granda homo ofte plezurigis nin per sia ĉeesto aŭ regalis nin per brilantaj paroloj. Ni esperu ke la Studrondo daŭre vivu ie, iel!

La organizanto de ĉiu studrondo portas pezan ŝarĝon sciante ke la partoprenantoj atendas altan normon, same kiel la antaŭaj. Mi diru, sen timo de kontraŭdiro, ke tiu ĉi Studrondo estis sukcesa, danke al ĝia organizinto, Hju Reid. Pasintan jaron li persvadis D-ron John Wells akcepti inviton kaj ĉi-jare li kaptis alian grandan fiŝon, D-ro Paul Gubbins! Kiu poste? Tiuj du eminentaj Esperantistoj ne necesas de mi ian enkondukon !

La Studrondo malfermiĝis kun parolado de D-ro Paul Gubbins. Paul elektis paroladi pri “Esperanto-teatro 100-jara.” Tiu temo, oni supozas, estas aparte kara al li, ĉar li mem jam verkis plurajn dramojn. Necesas scii ke la enhavo de tiu ĉi parolado estas la rezulto de originalaj esploroj dum multaj jaroj de du homoj – Paul mem kaj, antaŭ li, Marjorie Boulton. Feliĉe por tiu ĉi raportisto, Paul projekciis ŝlosilajn vortojn sur ekranon kiuj multe helpis ne nur Paul kiam li montris tabelojn de faktoj, sed ankaŭ ĉiujn nin pli facile sekvi kaj kompreni komplikajn sortimentojn da informoj. Laŭ sia karakteriza ĝisfundameco li kreis ordon el la 359 dram(et)oj: 103 estas skeĉoj; 35 estas monologoj; 168 estas unuaktaj

dramoj; 53 estas pluraktaj dramoj. Kiom verkitaj de viroj?- 70%. El kiuj landoj ili devenas?- ĉefe el Eŭropo, kaj tiel plu. Paul ne nur klasifikis la dram(et)ojn laŭ diversaj kategorioj sed ankaŭ regalis nin per deklamado de kelkaj elĉerpaĵoj el la kolekto. Kiel ekzemplo, li elektis deklami elĉerpaĵon de la sola versdramo de Bill Auld (“ Kvazaŭ Birdoj Konstruas Neston,”1953). Jen alia frandaĵo: Paul atribuas al Baghy, Tabata, kaj Marjorie Boulton, apartan kategorion—“klasikaj Esperantaj dramoj,” pro tio ke la dramoj traktas temojn pri toleremo, homarismo, kaj komprenemo. Je la fino de sia parolado Paul analizis la dram(et)ojn en tri fazoj:

1905-1903	Propagando
1922-1967	Idealista
1967-----	Analiza

Samtempe kiel la parolado de Paul, Hju Reid gvidis lecionon por kvar progresantoj. La leciono konsistis el daŭrigo de la kurso por komencantoj kiun Hju okazigis rete per la uzo de Skajpo post la unua leciono dum la Studrondo 2008. La leciono konsistis el tio ke Hju laŭtlegis anglalingvan frazon kaj petis al unu progresanto " Kiel oni tion diras en Esperanto?" La emfazo de la leciono estas ke partoprenantoj pripensu la frazon unue kaj nur poste eldiru ĝin. Ĉiu partoprenanto, laŭvice, devis doni la esperantan tradukon de diversaj frazoj. Je la vico de unu partoprenanto, la aliaj povas mem pripensi sian propran solvon de donita frazo, tiel ĉiuj partoprenas ne nur dum sia propra vico. La progresantoj raportis ke la leciono estis ĝuinda kaj utila.

En la posttagmezo okazis la tradicia ekskurso. Ĝi ankoraŭ restas populara parto de la studronda programo. Ĉiam ŝajnas al mi nekredible ke jaron post jaron la pasintaj kaj nuntempaj organizantoj povas trovi novajn kaj vizitindajn lokojn. Ĉi-jare la studrondanoj veturis autobuse al Falkirk por viziti “Callendar House,”majesta domo kun ĝia bela, kaj bone konservata bieno. Callendar House havas longan historion kiu respegulas la ŝanĝojn en la ĉirkaŭa regiono kaj en Skotlando ĝenerale. En la 18-a jarcento la proprieto de la majesta domo estis transdonita de malnova aristokrata familio al riĉa industriista familio. Ĝi estas tipa radikala ŝanĝo en la historio de Skotlando. Estis tempo de politika stabileco kiu sekvis la senkompatan subpremegon de la jakobistoj (aliĝintoj de la posteuloj de Jakobo 2-a kiuj malsukcese penis regajni la tronon) kio kondukis al kondiĉoj por la florado de novaj ideoj de eminentaj Skotoj kiel Adam Smith kaj David Hume kaj multaj aliaj apartenantaj al la “ Skota Klerismo”

Hodiaŭ la majesta domo kaj ĝia ampleksa bieno estas sub publika proprieto, kaj estas granda trietaĝa muzeo kies destino estas konduki la vizitanton laŭ koridoroj kie staras mekanikaj modeloj de la industria revolucio kaj serio de informpaneloj pri gravaj historiaj figuroj kaj eventoj en la periodo inter 1750 kaj 1850.

Baldaŭ post la reveno al Dunblane ĉiuj partoprenis en diskuto pri la estonteco de la Studrondo kaj de la Esperanta Asocio de Skotlando. La kialo por tiu kunveno estas tio ke la malabundo de membroj en ambaŭ minacas ilian estontecon.

Kiel oni atendas ĉe renkontiĝo nomata “Studrondo”, la programo rekonis la fakton ke la partoprenantoj falis en tri kategoriojn de lingva kapablo: lernantoj, progresantoj, kaj progresintoj. Do post la vespermanĝo oni povis elekti inter du programeroj: por lernantoj, “Lingva Ekzerco” gvidata de Tom Neil aŭ por progresintoj, “Verkista Angulo.” Dum multaj jaroj Tom gajnis lertecon pri klasoj por progresantoj. Per noveca vortludo Tom testis la vortstokon de la klaso. Poste li rakontis al la klaso strangan koincidon kiun li spertis revenante de la Universala Kongreso en Bjalistoko, Pollando. Por testi la parolkapablon de la klaso li petis ke ĉiu laŭ sia bontrovo rakontu pri koincido kiun ĉiu spertis. Ĉe la “Verkista Angulo” kvar progresintoj partoprenis en libera diskuto pri la arto de literatura verkado. Bonŝance unu el la kvaropo estis Paul Gubbins, kunfondanta membro de Akademio Literatura de Espranto, kiu donis helpeman konsilon al unu el la grupo kiu nuntempe sin okupas verki romanon. Aldone, interesa diskutpunkto traktis la influon de la germana lingvo, denaska por Ed Robertson, en la vorto “fremdiri” kiun li kunmetis por traduki la germanan “fremdgehen”. Sendube estis klaso nur por progresintoj, ĉu ne?

La lasta programero de la unua tago estis kvizo, gvidata de Duncan Thomson. Duncan jam de longe pruvis ke li estas lerta kvizmastro kies kvizoj apartigas la viglajn cerbojn forde la senspritaj. La kerno de lia kvizo koncernis la difinadon de strangaj, neordinaraj esperantaj vortoj. Li dividis partoprenantojn en kelkajn teamojn. Por ĉiu stranga vorto li prezentis plurajn difinojn, la plejmultaj sekrete skribitaj de la teamoj mem plus la ĝusta difino. La celo estis distingi la ĝustan forde la falsaj. Poento estis aljuĝita por ĉiu ĝusta elekto. Nesurprize, la teamo de Paul Gubbins gajnis la venkon. Interese la teamo kiu gajnis la venkon por la samspeca kvizo pasintjare estis tiu de John Wells. Ĉu estas moralo tie ĉi?

La kvizo finiĝis je la 9-a horo sabaton vespere. Tradicie, la plej babilemaj el la studrondanoj kolektiĝas post la lasta programero kaj forpasas la vesperon ĉe la apuda trinkejo. Oni povas diri ke tio estas neoficiala programero kies mankon oni sentos en la kazo ke la Studrondo ne plu okazos ĉe Dunblane.

Dimanĉe matene la studrondo malfermiĝis per ilustrita parolado de D-ro Paul Gubbins. Paul rivelis al ni ke lia alia pasio (liaj vortoj) krom Esperanto estas miniaturaj fervojoj. Kiel multaj aliaj plenaĝuloj li penas revivi sian knabecan entuziasmon pri fervojetoj. Ne por li ordinara elektra fervojeto lokita en la subtegmento de lia domo. Por kontentigi lian plenaĝan deziron li devis havi pli ambician miniaturan fervojon kun multekosta efektiva vapormova lokomotivo por treni la vagonojn. Sed kie konstrui la trakon kaj konduki la fervojlinion? Respondo: en la malantaŭa ĝardeno kie ajn! Ne gravas ke oni devas rearanĝi la florbedojn kaj aliajn plantojn. Pere de perfektaj bildoj projekciitaj sur ekrano, Paul kondukis nin tra ĉiuj etapoj en la disvolviĝo de lia "Mossley-Fervojeto" (jes, vi bone divenis, Mossley estas la nomo de lia kvartalo). La granda projekto komenciĝis en Majo 2008 kaj la granda solena malfermo kun familianoj, najbaroj kaj festkuko okazis en Aŭgusto 2009. Kiel la sezonoj ŝanĝis tiel la entrepreno progresis kun ĉiu etapo bone kaptita en bildoj. Ne diru ke Paul Gubbins havas nur unu klubon en sia golflklabujo!

Post kafpaŭzo la programo rekomenciĝis kun leciono por ĉiuj nomata "Traduku" kaj gvidita de Hju Reid. La arto de tradukado estas esenca parto de iu studronda programo. Jam de longe tiu studobjekto interesis Hju kiu, de tempo al tempo, kondukis lecionojn pri tio. Hju disdonis du paperfoliojn kun tekstoj, eltiritaj el Angla literaturo, kaj iam uzitaj de Bill Auld por testi la tradukkapablon de legantoj de la "Brita Esperantisto." Unu estis mezgrada kaj la alia estis altgrada. Hju petis ke ĉiuj provu traduki almenaŭ unu el la tekstoj. Li asignis sufiĉe da tempo por tion fari kaj poste li petis de homoj iliajn provojn de aparte malfacilaj eltiraĵoj el la tekstoj kiujn Bill Auld rigardis kiel diskutindaj. Tiam li rivelis la rekomenditan tradukon de Bill Auld por ĉiu eltiraĵeto. Estis ĝenerale interkonsentite ke la leciono estis ĝuinda kaj utila. Jen la efektiva malfermo de la Studrondo. Oni esperas ke venontjare ie kaj en ia formo okazos alia Studrondo.

Jack CASEY

Poezio en Esperanto

Je la 7-a datreveno de la naskiĝo de la irlanda Nobel-premiita poeto Seamas Heaney, mi aŭskultis radian intervjuon kun Heaney mem. Dum la konversacio, li priparolis la verkaron de la kimra poeto Dylan Thomas, kaj precipe lian faman versaĵon dediĉitan al lia mortanta patro *Do not go gently into that good night* (*Ne pasu milde al ĉi bona nokt'*). Heaney menciis, ke tiu poemo apartenas al la genro nomata *vilanelo* (france: *villanelle*), en kiu konvencio postulas, ke tiu versformo uzu nur unu rimon.

En la n-ro 177 de *Esperanto en Skotlando*, kiu aperis en 1999, la tiama redaktoro, nome la karmemora Hugh Martin, inkludis esperantan tradukon, kiun mi faris de la supre menciita poemo de Dylan Thomas. Tiam mi ne rimarkis, ke la originalo estas fakte *vilanelo*, kaj mia versio estis senrima, do ne tute fidela al la intenco de la poeto.

Mi ne scias ĉu iu esperanta poeto iam verkis *vilanelon*, sed bela ekzemplo en la skota estas la poemo *Villanelle* de Margaret Winefride Simpson (*O winter wind, lat grievin be/Lat grievin be, and murn nae mair/ Simmer sall set thy sorrow free* - esperante: *Ho vintra vent', ne ploru plu...*), en kiu la sola rimo estas la ripetita vokala sono *-i-* en *be - free - dree - see - pree - thee - dee*

Pro tio, mi reverkis mian tradukon de *Do not go gently into that good night* en *vilanela*formo, kaj mi esperas, ke ĝi pli bone respegulas la intencon de Dylan Thomas. Jen ĝi:

Ne pasu milde al ĉi bona nokt'

(Do not go gentle into that good night)

Ne pasu milde al ĉi bona nokt' / (/ = fino de verso)
Baraktu kontraŭ l' morto de la lum'. /
Maljuno devas flami je la fino. /

Kvankam saĝulo cedas al la brum' /

Fine, ĉar ne ekfulmis ties vorto. /
Ne pasu milde al ĉi bona nokt'. /

Bonulo post la lasta ond' kriante /
Kiel iliaj feblaj faroj dancus /
Brile sur verda golfo; furioze /

Baraktu kontraŭ l' morto de la lum'. /
Sovaĝaj homoj, kiuj sunon kaptis /
Dum ĝia flugo tra la mura trum' * /

Kaj kantis – sed malfrue tiam sciis /
Ke iĝis funebraĵo sur la voj' – /
Baraktu kontraŭ l' morto de la lum'. /

Ho severuloj antaŭ l' mort' vidante /
Ke eĉ okuloj blindaj tra la fum' /
Ĝojege povus meteore flagri – /

Baraktu kontraŭ l' morto de la lum'. /
Kaj vi, ho patro, tie sur altaĵo /
Trista, malbenu – benu min per viaj /

Koleraj larmoj, petas mi en sum': /
Ne pasu milde al ĉi bona nokto /

Baraktu kontraŭ l' morto de la lum'. /

* trumo (PIV): spaco inter du fenestroj.

Parenteze, mi iam legis (ĉu tio certas, mi ne scias), ke kiam Dylan Thomas estis juna, la gepatroj ne permesis, ke li parolu la kimran lingvon. Laŭŝajne ili timis, ke uzado de la etna idiomo malhelpus bonan prononcon de la angla. Bedaŭrinde, similan sperton havis multege da skotaj infanoj, kiuj nature parolus la skotan aŭ la gaelan, sed ne estis permesitaj.

Garbhan MacAoidh (Girvan McKay)



Mirinda travivaĵo

105a Skota kaj Internacia Kongreso de Esperanto, Berwick upon Tweed

Malofte mi partoprenas en strukturo, kiun oni nomas en esperantio “Neŭtraluloj”, tamen mi estis dum pluraj jaroj prezidanto de unu el la plej grandaj kluboj el la mondo, La Verda Stelo en Antverpeno. Ed Robertson donis al mi grandan plezuron inviti min kiel gastpreleganton al la Skota Esperanto-Kongreso, kaj tio malgraŭ fakto ke li jam partoprenis prelegojn de mi en sino de SAT. Mi menciis ĉu, ke mi agadas precipe en SAT?

La 4-an de junio mi prenis aviadilon al Frankfurto kaj poste al Edinburgo kie Ed atendis min. Glason da vino en domo de Ed sufiĉis por ke David Kelso alvenis kun aŭto por veturigi nin al Berwick. En preskaŭ plena silento ni admiris la lertecon de David veturi laŭ mia penso en la malĝusta flanko de la vojo.

La rakontoj de kuraĝaj turistoj kiuj fajfas pri guteto da pluvo, pri Skotlando ne estis troigo. Ĝi damne estas belega lando. La beleco de la pejzaĝo daŭris eĉ kiam Ed diris ke ni eniris forŝtelitan parton de Skotlando, la regiono de la urbo Berwick. Kiam ni pere de la ponto trapasis riveron Tweed, mi tuj komprenis kial oni nomas Berwick, Berwick up on Tweed.

Ed kiu rolas kiel prezidanto de la asocio tuj devis labori, sed David kaj mi havis buŝon tiel malsekan ke ni urĝis al trinkejo por gustumi skotan bieron. Verdire la biero estis tiel bongusta ke mi devis daŭrigi gustumadon dum la tuta kongreso. Feliĉe mi havis plurajn kungustumantojn kaj neniam sentis solan kaj tristan pro manko da biero. Kiam ĉiuj enlitiĝis Ed instruis min pri konsumado de viskio. Vere li estas pli ol lerta instruisto.

La unuan tagon mi jam interkonatiĝis kun la skotaj esperantistoj. Ĉu afableco estas kutimo en Skotlando? Plej verŝajne jes kaj vere ĉiu homo alparolis min plej amikan.

Kio okul-, aŭ ĉu mi diru orel-frapis estas kiel ofte homoj demandis “de kie vi venas”? Ĉar mi volis esti same afabla kiel la skotaj amikoj, mi ne diris “el plej grava loko de la mondo” kaj do simple diris “el Antverpeno”. Jes pluraj jam vizitis mian urbon dum UK en 1983.

Fari prelegon en nekonata medio, ĉiam donas iom da streĉo: ĉu multaj homoj ekdormas? Nu eble pro mia sufiĉe laŭta voĉo neniu dormis kaj plie, je fino oni aplaŭdis min. Ĉiam ekzistas dubo ĉu pro fakto ke prelego estas bona, ĉu homoj estas afablaj, aŭ ĉu pro fakto ke fine mi silentis?

Ĉe tago de alveno la vetero rifuzis esti aĉa kaj imagu ankaŭ la duan tagon la suno bonvenigis nin kiam ni forlasis liton kaj sidante duonsune kun Ed ĉe plej bongusta matenmanĝo ni diskutis pri mil aferoj, ĉiuj ege gravaj.

La tago komenciĝis per kunsido de la komitato. Mi profitis de la libera tempo por iom viziti la urbon kaj trinki kafon. La kafo funkciigis la cerbon kaj mi pensis pri la antaŭa tago prezento far Garbhan MacAoidh. Pri lia majstra traduko de *La Infana Raso* de Bill Auld al la skota kaj angla lingvoj. Kiel eblas ke homoj kuraĝas pri ĉi tiu giganta projekto!

Revenante en la kongresejon, David Kelso jam estis preta por prelegi pri “Esperante pri kio, efektive?” La elokventeco de lia parolo estis prave aplaŭdata. Kiam mi nun aŭskultas al “La Espero” mi almenaŭ komprenas ĝian signifon.

Kafo, teo kaj kuketoj donis eblon iom diskuti pri la vortoj de David. Tiam estis tempo al mi por klarigi per prelego kial homoj prefere ne aĉetu diamantojn.

Duonan horon post tagmezo, ni prenis aŭtobuseton al insulo Lindisfarne. Se paradizo ekzistas, mi esperas ke ĝi similas al ĉi tiu belega speco da naturo. Vere mirindege. Ni promenadis en plena suno kaj lernis pri la historio de la insulo. La tajdo devigis nin reiri al Berwick kie ni gustumis vespermanĝon en etoso plej amika. Io tamen frapis min. Estas nekredeble kiel ofte en rondo de neŭtraluloj oni diskutas pri gramatiko. Mi neniam bone komprenas tion. Jam mil jaroj aŭ iom pli mi parolas la antverpenan kaj neniam faris al mi demandon pri ĝia gramatiko. Ah, mi vere estas nur uzanto de la lingvo universala kaj miaj kutimaj diskutoj iras pri politiko kaj filozofio.

Ĉu mi jam diris ke la loĝejo kiun Ed elektis por mi estis bonega? La lito donis agrablan senton kaj krom kelkaj ebruloj kiuj klopodis eniri mian ĉambron kaj vekis min per tio, mi havis bonajn noktojn. Dimanĉe okazis la Fiservo: “Kion mi kredas”. Post enkonduko de David kaj mi, ni eniris plej interesan diskuton. Mi ĝuegis.

Ed gvidis la partoprenantojn tra la historia urbo Berwick kaj kiel tagmanĝo mi havis sandviĉon kun la kutima skota biero. Strange ĉar maloftege mi trinkas bieron, sed kial ne al kutimiĝi al moroj kaj kutimoj de la loko?

Ian MacDowall enkondukis debaton pri “Plezurveturado - ĉu minacita estonteco?”. Temas pri la stranga ŝanĝo en maniero vojaĝi la lastajn jarojn. Kie oni, kiel diris Ian, antaŭ 30 jaroj simple povis preni aviadilon, ricevi bonan manĝon kaj bonegan servon, nun ŝajnas ke vojaĝi estas pli peza tasko pro la ekstraordinaraj kontroloj kaj la ĉiama klopodo doni malpli da servo al la gastoj de la flugkompanio.

Vesperan manĝon ni prenis en iu speco da hinda restoracio. La etoso estis bona kaj ni diskutis pri alia temo ol gramatiko. UF!

Post lasta biero en trinkejo mi iris sufiĉe frue al hotelo ĉar tagon poste mi devis jam je la 9-a 30 preni trajnon al Edinburgo.

Survoje mi denove ensorbis la belecon de la naturo kaj aŭskultis al cent diversaj homoj kiuj sengene telefonis al konataj.

En Edinburgo, mi montris ke mi lernis esti skoto. Anstataŭ preni kostan taksion mi uzis la aŭtobuson al flughaveno kaj ŝparis per tio plurajn pundojn.

Mi vizitis unuan fojon Skotlandon kaj mi scias ke certe ne estas lasta fojo ke mi gustumis la etoson de la Skotlanda Kongreso. Eble ĝis venonta jaro en Lockerbie? Dankon Ed, dankon skotaj amikoj. Vi donis al mi mirindan travivaĵon.

Jakvo Schram

Abonilo

ESPERANTO-ASOCIO DE SKOTLANDO (EAS)

Kotizo al EAS / abono al “Esperanto en Skotlando” por 2011:

Dankon pro via ĝisnuna fidela subteno. La jarabono komenciĝas en januaro ĉiujare. Plene pagitaj membroj de EAS ricevas “Esperanto en Skotlando” kaj la “Scottish Esperanto Bulletin” senpage.

Sendu al: Membreca Sekretariino S-ino M. Casey, 9 Flora Gardens, Bishopbriggs, Glasgow, G64 1DS



Elektu kaj indiku la kategorion

Kotizo al EAS kaj senpaga ricevo de la gazetoj	£10/€11
Ne-membro en Britio kiu abonas nur al EeS	£6/€7
Ne-membro en alia lando	£10/€11
Ekstra jarabono de EeS al la sama adreso	£5/€5.50
Studento	senpage

Donaco al Esperanto-Asocio de Skotlando

Totala sumo

Nomo

Adreso

.....

Poŝtkodo

Telefono

Resendu ĉi tiun folion (aŭ kopion), kune kun via pago. Se pagante per £ pagu ĉeke al la adreso sube; ekzistantaj abonantoj kiuj ne havas adresŝanĝon povas simple sendi la ĉekon – ne necesas replenigi la formularon. Ĉekoj estas pagendaj al: “Scottish Esperanto Association”. Se pagante per €, vi povas pagi kontantan monon (ne ĉekojn) rekte al la adreso supre, aŭ alternative vi povas pagi en nian UEA-konton **eask-1** kaj sendi al ni la formularon, indikante ke vi jam pagis en nian UEA-konton. Bv. noti ke kvitancoj ne sendiĝos ĝis la sekvanta numero de **Esperanto en Skotlando** eldoniĝas.

El la redakcia rubujo

En flegejo, aron da geolduloj preparolis siajn malsanojn. “Miaj brakoj estas nun tiel malfortaj, ke mi apenaŭ povas levi ĉi tiun tason da kafo”, diris unu el ili.

“Jes, mi scias”, diris alia. “Miaj kataraktoj estas tiel malbonaj, ke mi eĉ ne povas vidi mian kafon”.

“Ne diru - miaj manoj estas tiel kripligitaj, ke mi eĉ ne povis marki krucon en la balotado”, proponis tria.

“Kio?! Pli laŭte! Mi ne povas aŭdi vin”, kriis kvara.

“Mi ne povas turni la kapon pro mia artrito”, diris kvina oldulo, kaj pluraj aliaj malforte kapjesis konsente.

“Mi daŭre forgesas kie mi estas kaj kien mi iras”, opiniis maljuna viro.

“Mi supozas, ke jen la prezo de maljuniĝo”, ekspasmis oldulo, dum li malrapide ŝanceliĝis. Kaj ĉiuj aliaj konsentis kapjese.

“Tamen, taksu bone la valoron de viaj benoj”, anoncis unu virino ĝoje, “ni ĉiuj ankoraŭ rajtas veturigi aŭton” ...

* * *

Edzo kaj edzino estas ĉehejme, kaj la edzino rakontas al la edzo pri sia tago en la laborejo.

Edzino: Mi havas demandon por vi. Imagu, dummomente, ke mi permesus al vi seksumi kun iuj ajn tri virinoj en la mondo. Mi diros al vi kial mi demandas. La koleginoj diskutis en la laborejo hodiaŭ. Ĉiu el ni faris liston de la tri viroj en la mondo, krom la propra edzo aŭ koramiko, pri kiuj ni plej fantazias fari amoron, ekzemple Barack Obama, Brad Pitt, Robert Downey, ktp. Do, se vi devus fari tian liston, kiujn tri virinojn vi elektus?

Edzo: Karulino, mi amas nur vin!

Edzino: Jes, jes. Fantazie, mi celas. Mi scivolemas pri kion vi pensas. Nur por amuzo. ... Ĉu mi diru al vi kiujn tri virojn mi elektis?

Edzo: Nu, se vi volas.

Edzino: Okej. George Clooney, Johnny Depp kaj – ne ridu – Robbie Williams!

Edzo: Ho, ĉu?!

Edzino: Vi diru viajn fantaziojn. Angelina Jolie? Nicole Kidman? Ne Carla Bruni-Sarkozy, ĉu?! ... Kiun vi elektus?

Edzo: Kiom mi rajtas havi?

Edzino: Tri. Krom min, kompreneble.

Edzo: Ĉu mi rajtas havi kvar?

Edzino: Nu, jes, en ordo.

Edzo: Iun ajn en la mondo?

Edzino: Jes. Do?

Edzo: Do, la edzinon de mia ĉefo, tiun najbarinon trans la strato, la instruistinon de nia filo, kaj ... vian fratinn!

* * *

Kompatinda Michael O'Leary, ĉefulo de Ryanair. Alveninte en hotelo en Dublino, li iras al la baro, kaj petas pajnton da Guinness.

La baristo kapjesas, kaj diras “Tio kostas unu eŭron, mi petas, sinjoro O'Leary”.

O'Leary respondas “Tio estas tre bona prezo”, kaj transdonas la monon.

La baristo akceptas la monon, kaj demandas “Ĉu vi deziras glason kune kun via Guinness, sinjoro?”.

Leteroj el fora lando (1)...

Reduktita Estimato -

Mi nepre, tra via moŝto, petu pardonon de via nombrega, plurkontinenta legantaro, pro mia longeta silento. Jes, mi konscias ke ekzistas inter tiu eminentularo, kelkaj bedaŭrinduloj kiuj opinias ke tiu silento estas tute akceptebla, bonvena eĉ. Al ili mi memorigu ke nur per peno kaj sufero ni antaŭeniros. Nia Afero konsistas ne nur el celebraj kukoj kaj ceremonia tetrinkado. Ho, ne. Kun la kukoj oni devas akcepti la kelsojn, la kejsiojn eĉ. Jen la esenco de nia Sinvenkismo.

Al la aliaj, la Vasta Plimulto, kiuj rimarkis, bedaŭris kaj inter si, en siaj klaĉrondoj, pridemandis la Silenton el Fora Lando, mi klarigu ke temas pri Krizo de Konscienco, ja. Survoje al Damasko, antaŭ kelko da monatoj, mi subite konstatis ke mi, fervora sennaciulo, ne povis plu subapogi 'nacian' revuon, *Esperanto en Skotlando*. Notu - 'en Skotlando'; ne alilande, ne interlande, kun alilingvanoj - Ho, ne! Nur 'en Skotlando', inter pursangaj skotoj (aŭ konvertitoj al skotismo) tute kontraŭa al mia filozofia fundamento. (Ne tuŝu!) Mi tuj atentigis la redaktoran Moŝton pri tiu skandalo kaj proponis ke ni tuj ŝanĝu la nomon de nia gazeto - cetere, de la tuta eldona korporacio - al 'Esperanto sen Skotlando'.

Vi ĉiuj ja scias ke nia kara (t.e. Kostega, ne amata) pled-aktoro estas eksisto? Notu, mi ne malkaŝas ke li ekzistas - tion vi kredeble jam rimarkis - sed ke li trapasis dum lastaj 40 jaroj tiom da ismoj, ke oni ne povas plu difini lian ideologian situon: li difiniĝas per kio li ne plu estas - li estas vera 'eksisto'. Nu, pro tio li kapablas kontraŭargumenti ian ajn aserton, simple demetinte unu ismon, surmetante alian - sofisto, ĉu, aŭ vestisto? Nu, li provis konvinki min ke tia titolŝanĝo (al 'Esperanto sen Skotlando') tute ne efikus, ĉar neniu rimarkus unu aldonan litereton (s) inter tiom da preseraroj. Kia insulto! Vidante ke tiu argumento ne sukcesis, li plu argumentis ke 'Esperanto en Skotlando' estas perfekta sintezo el koncepta dialekto. Se 'Esperanto sen Skotlando' estu mia tezo, nu la maltezo estus 'Esperanto kun Skotlando', el kio la fina, nepra sintezo estus 'Esperanto en Skotlando'! Ne, nek mi komprenis pri kio li balbutis, sed la viskio bonege gustis (ĉiu pokalo iom pli ol la antaŭa), do mi decidis simple akcepti lian subaĉeton. Tiu letero tial neniom estas volontula kontribuo al

nacieca eldonaĵo; via trudaktoro *devigis* min verki ĝin per plurhora argumentado, ofte per vortoj plursilabaj, akompanata de kontraŭvola drinkigo de miriga kvanto da viskio.

Nu, pri kio mi ne parolis? Ha jes, Fora Lando. Post mia Krizo de Konscienco, nia cedaktoro aranĝis ke mi ricevu, en januaro 2010, iom da kuraca konsultado de la glasgova rondo de legantoj de nia renoma revuo. Intertempe, li rekomendis ke mi iom ripozu en fora lando, preferende plej fora lando. Nu, en ordo, mi prunteŝtelis maplibron el la redakcia biblioteko kaj trovis - laŭ mia neperfekta geografia scio - la landon en Eŭropo plej foran de Skotlando. Nomiĝas Kalabrio, speco de mal-Skotlando: dum Skotlando estas la bela ĉapelo de Eŭropo, Kalabrio estas la same bela piedpinto. Hodiaŭ, la suno brilas, kvankam malalte, vintre; flankeniginte mian dialektikan krizon, mi akriĝas unu finon de plumo, suĉante la alian ...

En Kalabrio nenio rapidas, inklude mian ellitiĝon. Vekiĝinte je tute deca horo, mi restas en la lito, pensante pri aferoj ne mencioblaj en familia periodaĵo, kaj aŭskultante la radion - pli precize, *Radio Radicale*. Nu, antaŭ kelkaj jaroj mi elektis tiun elsendejon simple ĉar la signalo plej fortas kaj tute malestas reklamoj - Ho, ĝoj' ! Tamen, pograde mi varmiĝis pri ĝi ĉar ĝi estas tute neordinara elsendejo. Ĝi apartenas al la Radikala Partio en Italio (tiu, fakte, kiu subtenas Esperanton) sed neniom estas propagandilo. Aŭdiĝas je RoRo, voĉoj el ĉiuj partioj, ĉiuj vidpunktoj, ĉiam pri la politiko, publikaj aferoj. Ĉiumatene mi aŭskultas programon pri 'la alilanda gazetaro', kiu donas ne italan sed plurlandan perspektivon pri demandoj italiaj, eŭropaj kaj tutmondaj. [Hej, Reduktita Moŝto - bona ideo por *Esperlando sen Skotoj*, ĉu ne?]

Lastatempe, RoRo raportis pri la afero de krucifiksoj en italiaj klasĉambroj. Eble vi aŭdis ke Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj juĝis ke tiaj krucifiksoj devas ne pendi sur muroj en ŝtataj lernejoj; en privataj katolikaj lernejoj, nenia problemo, sed ne en ŝtataj, kiuj estas, laŭ la Kortumo, ne nur por katolikoj sed por ĉiuj ŝtatanoj. Nu, vi povas imagi la reagon en Italio, hejmlando de la romkatolika eklezio ! Ŝajne ĉiuj, de la Papo mem al la ĉefministro, Silvio Berlusconi (ja longa distanco, tiu!), tuj kondamnis la juĝon, protestante [pardonu] ke la kristanismo, de kio la krucifikso estas ĉefa simbolo, estas kerna elemento en la kulturo de Italio kaj de Eŭropo. Cetere, oni diras, la krucifikso ne estas ekskluda simbolo: *ĉiuj* rajtas ĝui la bonojn de la kristanaj eklezio kaj preĝejoj ??

Kontrastu kun Britio, kie ĉiuj strebas esti pli 'plurkultura' ol la najbaro (almenaŭ parole!). Oni eĉ uzis tion kiel ĉefargumenton por venigi al Londono la Olimpikajn Ludojn en 2012. Almenaŭ oficiale, en Britio, plurkulturismo estas 'Bona Afero'; en Italio, ne. Kredeble, estas en Italio proporcie eĉ pli da lastatempaj enmigrintoj ol en Britio (vere, neniu scias!), sed (preskaŭ) neniu proponas ke la kulturo, la valoroj, la vivstilo de Italio adaptiĝu al la novaj faktoj. Male - la enmigrintoj adaptiĝu al la itala vivmaniero. Tiu kontrasto levas la demandon: Kio difinas la nacian/ landan identecon? Ĉu la lingvo, la religio, la haŭtkoloro, la historio, la geografio, la legendoj, la valoroj, la tradicioj, la folkloro, eĉ la sportoj, de la loĝantaro?

Iom pensinte pri tio, ŝajnas al mi ke sufiĉe varias de lando al lando, de gento al gento. En Skotlando, multe gravas, ĉu ne, la geografio (niaj karaj montoj kaj valoj, kun fona muziko de sakfajfilo, nuboj...), la parolmaniero kaj la historio (Wallace, Bruce, Jock Stein ...)? En Anglio, ŝajnas al mi ke pli gravas ia ideala kampara vivstilo - vilaĝoj, tavernoj, vulpĉasado, lordeto en kasteleto ktp. En Francio, la kultura historio kaj la lingvo (ja, la lingvo, ne tiuj regionaj lingvetoj!); en Pollando, nepre la lingvo kaj la religio. En Usono? - nu, iuj komunaj valoroj kaj atingoj ekonomiaj, ĉu ne? - kaj la milita potenco? Sed, ne disputeblas, ĉu, ke en diversaj landoj, la senso de nacia identeco devenas de diversaj fontoj. En Italio, sufiĉe lastatempa 'nacio', la religio, komuna jam dum 1700 jaroj, jes gravas; en Britio, jam dum 500 jaroj plurreligia, tio vere ne gravas. Evidentas, do (al mi, almenaŭ) ke tiu 'nacieco' estas tute artefarita koncepto kiu aliĝas al ajna komunaĵo facile disponebla! Pro tio tiom gravas la futbalo - ĉar pri tio, tute simbola komunaĵo, ĉiuj povas facile interkonsenti

Kio sekvas? Kio pri Eŭropa identeco? Nu, mi ne certas sed kiam mi ĉeestos la kunsidon ĉe la ĝlasgova kuracorondo, mi ne dubas ke ĉio rapide klariĝos. El fora lando, kie tiaj demandoj neniom perturbas la trankvilon -

David Kelso

Leteroj el fora lando (2)...

Tie ĉi, en mia 'malSkotlando', en plej suda Eŭropo, la vetero, dum kelkaj tagoj, estas nekarakterize aĉa: abundis pluvo kaj vento, kaj, laŭ kalabriaj normoj, sufiĉe malvarmis. Mi do restas endome kun miaj libroj, miaj pensoj, mia plumo, sorĉa muziko kaj iom da likva karburajo.

Dum lastaj semajnoj, mi legadas ĉefe ĉirkaŭ la temo de ideologio en la Esperanto-mondeto, ĉar la ĉefulino de la ĉi-jara brita kongreso (bone konata inter legantoj de ĉi respektinda revuo) insistis ke mi iam, ie, kaj jes malebrie, promesis fari ian kontribuajon (decan, cetere) al la programo de tiu diboĉofesto. Nu, kiam tiuj vortoj frapos la senkulpan, senpekan, ĉu senpensan, legontaron de supre menciita periodaĵo, la kongreso estos jam pasinta, mia kontribuo jam delonge forgesita. Tamen, *Ideoj ne mortas* (citaĵo de moŝta redaktoro, kiu trovis ĝin en redaktora gvidlibro), kaj la cerbo de via sudeŭropa korespondanto estas neelĉerpebla puto. (Ĉu pro tio la moŝto ofte nomas min 'idaĉo de elĉerpita putino?') De kiam mi finfaris la verketon, mi plu pripensis la temon; ekis novaj ideoj, po unu-du semajne

Tial, karaj, toleremaj, longe suferantaj legantoj, mi proponas dividi kun vi novan ismon - finraŭmismo ! (aŭ eble 'firaŭmismo'; pri tio mi bezonas konsilon de la lingva fako de la redakcio). La junaj esperantistoj de Raŭmo (1980) estas nun oldetuloj; unu estas eĉ ŝtatestro, kvankam de tre eta, virtuala ŝtato, kies nomo zumzumas rande de mia memortruo ĉu 'La Ŝvitio' aŭ io tia ? Kaj raŭmismo mem ankaŭ iom maljuniĝas. "Ni kultivu nian ĝardenon" diris Humphrey Tonkin (jen vera oldulo, eĉ pli ol mi), priskribante tiun doktrinon kiam li ne plu pisis en la tendon de UEA, sed elen de. Pli juna (nu, mezaĝa) kritikanto de la raŭmaj ĝardenistoj, Aleksandro Korĵenkov (iama gasto en nia benita landeto), rimarkis ke necesas ne nur ĝarden-kultivado, sed iom da lingvano-kultivado. Kutime lingvo-komunumo sin daŭrigas bredante novajn lingvanojn - alikuntekste, 'infanojn'. Nu, en tiu fako ni esperantoj pli esperas ol sukcesas: eĉ mi, modelo de sindediĉo, kreinta (post multa penado) trion da tioj, el kiuj neniuj estas esperantano. (Des pli neniuj estas nobel-premiito, sed pri tio en onta letero). Same tra nia verda mondeto. Do, proponas Korĵenkov, se ni fuŝis pri bredado de lingvanoj, ni nepre daŭre varbadu !

Ha, diras la aglo-okula leganto, sed tion jam proponas la fivenkistoj! (pardonu - finvenkistoj) - 'Ni varbu kaj varbu konstante!' Ha jes, ĉionscianto, sed sciu ke estas varbado kaj 'Varbado' (ankaŭ 'farbado' sed tio estas alia, pli elita fako, pri kiu mi vere ne kompetentas). Korĵenkov proponas ke ni varbu novajn socianojn, ne promesante baldaŭan finan venkon, konfitaĵon morgaŭ kaj serenon senmortecon, sed ofertante ĝuste nian karan, plaĉan, amikan, komunan kulturon. La ĝardeno de Tonkin, diras Korĵenkov, ja belas: ni do reklamu ĝin kaj invitu novajn kultivontojn !

Jen do genia sintezo de la finvenkismo kaj raŭmismo - Firaŭmismo. Sagacaj, tiuj rusoj, ĉu ne? (Ĉu vi scias, parenteze, ke rusoj loĝas en rusujo? kaj ruboj en rubujo, pomoj en pomujo - kia enhava lingvo, tiu nia!) Tamen, ne tute originala ideo ĉu ekzistas tute originala ideo? [respondoj longaj ĝis 5000 vortoj, per poŝtkarto al la helpredaktoro pri konkursoj]. Ĉu vi konas la nomon Umberto Eco? Ne 'Eho' - foje oni tiel aŭdas sed estas trompa sonfenomeno. Antaŭ kelkaj jaroj, kiam mi ankoraŭ havis memorkapablon, tiu itala 'similideano' argumentis ke fakte Esperanto ne estas strangaĵo (kaj, pardonu, kiu diris ke jes?): ĝi estas koncepto en la ĉeffluo de la eŭropa pensado. Jen - tion vi ne sciis, ĉu ? Legu nian klerigan revuon kaj Lernu ! Dum jarcentoj filozofoj (mi ĵus mistajpis 'fikozozofoj' - pensiga koncepto) serĉas 'perfektan lingvon' per kiu oni klare, precize kaj facile kompreneble esprimu ideojn. Ĉiuj lingvoj estas neperfektaj esprimiloj, do ni strebu plibonigi ilin, proksimiĝi al la perfekta..... Nu, la plej aŭdaca, plej ambicia, ĝis nun plej sukcesa provo krei pli bonan komunikilon, esprimilon, estas jes nia kara ĝardenlingvo !

Kaj ne plu projekto, ĝardendesegno: post 120 jaroj (pli ol Tonkin, tiom) ĝi estas jes matura, daŭre maturiĝanta lingvo kaj kulturo. Neniu fakularo en la mondo tiom interesiĝas pri ĝusta esprimo de ideoj, ol ni. Kie, krom en nia ĝardeno, oni dum jardekoj debatas la respektivajn meritojn de participoj (ata kaj ita)? Vere, ne temas pri nur 'Esperanto-komunumo' sed pri transkultura, transetna komunumo kiu funkcias per la plej efika translingvo, Esperanto. Ni do konsciu pri tio, ni diskriu el niaj fenestroj, ni fieru, ni fanfaronu, ni kompatu la ceterajn, unu-kulturajn, unu-etnajn sociojn. Ne temas pri Fina Venko sed pri Eka Venko, okazinta en 1887. Estas ni la ekvenkintoj, ni kultivu nian ekvenkon, ni kreu tutmondan ĝardenon kie la ĝardenanoj ne perfekte, tamen plej bone, komprenas unuj la aliajn.

La tri-kvar legantoj kiuj ne jam endormiĝis, eble rimarkis ke meze de mia kadukula kaĉaĵo troviĝas unu-du interesaj ideoj (respektive rusa kaj itala ? - aŭ 'atala' se vi insistas). Ni ne pardonpetu pro nia lingvo; ni jes fieru pri nia unika, moderneca, tutmondeca kulturo. Kaj ni konatigu ĝin ne ie ajn, sed kie troviĝas tiuj kiuj kredeble interesiĝos pri tia mirakla kreaĵo - inter la radikalaj rondoj: verduloj, alternativuloj, precipe ĉiuj kiuj subtenas la Tutmondan Socian Forumon, serĉante tie pli bonan, pli justan, pli daŭripovan mondon.

Tamen, revenis la suno do mi devas adiaŭi, ĝis venonta letero, venonta vetero. Vivu firaŭmismo ! Eku la eĥo !

David Kelso

(kaŝnomo de ĉarma modestulo el Kalabrio)

Postpenso por sendormuloj:

'Kiu nek ruktas, nek furzas, baldaŭ eksplodos.' Profunda penso el franca neceso. Pripensu, elektu, ĝuu, nepre ne eksplodu



**Andrew Weir kun la Vicurbestro de Dundee
en la 104a Skotlanda Kongreso 2009**

“Je nia Stano!”

I learned Esperanto only six months ago, and when I heard about the 104th Scottish Esperanto Congress which was to take place in Dundee, I decided I certainly would go along. I only heard Esperanto spoken for the first time when I visited the Esperanto Club in Glasgow, so I had no idea what an Esperanto Congress would be like. The Congress took place in Dundee, the home town of the President of the Scottish Esperanto Association (SEA), Andrew Weir. When I arrived I was happy to see that many of the participants were members of the Glasgow Club; and there were also people from France and Portugal.

During the official opening ceremony in the town hall, the depute Provost of Dundee welcomed us and our highly accomplished guest speaker, Stano Marček, from Slovakia, and editor of Esperanto, the organ of the World Esperanto Association, was presented to us. When I spoke to Stano, it was the first time I had spoken Esperanto to someone who doesn't speak English, and I was surprised how easy it was for a beginner like me to hold a conversation in Esperanto. When we returned to the Congress venue I got to know the other participants – they were all very nice and very capable Esperantists, but I noticed that Andrew and I were the only two of student age – it's a pity that there aren't more young people in SEA.

The first event the next day was a talk by our guest, Stano. (By this time we were already used to raising our glasses to the words “*je nia Stano!*”, a wordplay on “*je nia sano!*”). He gave a very interesting talk about his 'direct method' of teaching Esperanto, and once again I was surprised that even inexperienced Esperantists can understand so much, and as he spoke about the first chapter of his textbook, I was actually able to understand everything.

In the afternoon we went on our excursion to the fruit winery “Cairn o' Mohr” to find out how they make wines from soft fruits. The winery guide spoke and spoke about the making of wine in more and more detail until finally, to everyone's joy, Jack Casey told her “we've listened to you enough, can we try the wine now?” Happily, the response was “yes” and we were able to try all kinds of wines from different fruits. Poor Stano

landed up with a lot of wine to drink, because Andrew gave him all of his (because he was driving), but Stano didn't seem too unhappy!

Later a religious service (*diservo*) took place for the Christian Esperantists, and simultaneously for the rest of us what was jokingly called a *fiservo* [Translator's note: a wordplay on *diservo* meaning “divine service”. This was an very interesting discussion group lead by Andrew on the inter-relationship between religion and Esperanto, which later turned into a chat about the *homaranisma* philosophy of Zamenhof.

In the evening the Congress Dinner took place, and although I didn't take part, I arrived just in time to hear the many amusing (and loud!) jokes by David Kelso about Scotsmen, and the many witticisms based on wordplay. For example, when the current in-word *mojoso* (*moderna juna stilo*; “modern young style” = “cool”) was explained to Hugh Reid, he created a new word, *momoso* (*malmoderna maljuna stilo*; “passé geriatric style”) for the use of the less youthful generation!

The final day began with two more talks of the highest level – a talk by Hugh Reid about how Esperanto could be more effective if it had its own Economy, and talk by Stano about the history of the magazine Esperanto. In the afternoon there was a discussion group during which we talked about various topics related to Esperanto. Our small group was given the topic “Is Esperanto without an ideology like a train without rails?” David Kelso, who to my mind made very skilful wordplay replied that Esperanto could work very well without an ideology, so it isn't a train without rails so much as a trolleybus! The event finished with the AGM of SEA, where it was decided that the next Scottish Congress will take place in Berwick-upon-Tweed – a town a little over the border with England, and Andrew, our president, who will soon be moving overseas, closed the Congress.

So I would like to express heartfelt thanks to Andrew for an excellently organised and enjoyable Congress and to David Kelso for the subsidy of the Norwich Jubilee Fund with he administers – for me the Congress was a great opportunity to hear Esperanto spoken, taste wine, and to see how quickly one can understand Esperanto after learning language for the first time. Thanks to everyone in SEA!

Shey BISHNOI

Venĝo dolĉas

Mi ne scias ĉu vi iam uzis la senpagajn mapajn retejojn provizatajn de retaj kompanioj, kiel Multimap kaj Google. Jam delonge mi preferas la sistemon de Google kaj ofte uzis ĝin por ekhavi precizajn vojajn direktojn kiam ajn mi veturas al nekonata loko. Eblas elpresi la paĝon, kaj jen, oni havas enmane, engrimpante la aŭton, la koncernan mapon por sia specifa vojaĝo. Plej novan eblecon nun anoncis Google: nome “Google Street” (“Stratvido per Google”). Ŝajnas ke dum tuta jaro aŭtomobilo(j), surportanta(j) fotilan aron, fotadis sennombregajn stratojn en Britio, Usono, Aŭstralio kaj pluraj aliaj landoj. Nun vi povas vidi la rezulton, se vi havas nur adekvatan retan ligan kaj ordinaran ttt-an krozilon (angle Browser). Ne necesas deĉerpi nek instali aldonan programon kiel “Google Earth”; nur la krozilo necesas. Navigu al www.google.co.uk aŭ www.google.com, entajpu la nomon de via urbo en la skatoleton kaj serĉklaku. Post momento aperos stratmapo kiel kutime.

Nu, jen la interesa afero. Se aperas je la supra maldekstra angulo de la mapo eta flava virfiguro, jen indiko ke la regioneto jam estas fotografita kaj devas esti eble vidi la domojn kvazaŭ vi mem irus en la strato! Musklaku sur la flavan vireton kaj trahu lin al la strato kiu interesas vin. En tiu momento la stratrandoj koloriĝos blue, indikante ke fotoj ja videblas. Lasu la vireton sur la celata punkto. Depende de la rapido de via reta ligo aperas post momento 360°-a panorama bildo de la strato. Vi povas ŝanĝi la rigard-direkton per mustraĥo de la bildo. Ekzemple, por turni la rigardon maldekstren musklaku sur la bildon kaj trahu dekstren; same inverse. Per subentraĥo vi eĉ povas vidi la ĉielon! Vi povas “piediri” laŭ la strato per sinsekvaj klakoj sur la blankaj sagoj. Esploru kaj ĝuu!

Nu, kio pri venĝo? Antaŭ tempoperiodo kiu nun nombras en dekoj da jaroj mi pasigis monaton en Florido, Usono. Mi aŭdis tie anekdoton kiun mi plurfoje re-rakontis post mia reveno al Skotlando. La anekdoto ĝuindas eĉ se ĝi dependas de mia magra kapablo vorte priskribi la du koncernajn konstruaĵojn, sed pli belus se vi povus vidi ilin, starantaj mem antaŭ ili en Sankta Petersburgo. Kompreneble mi faris fotojn kiam mi estis tie, sed ili ekzistas nur kiel diapozitivoj. Sen projekciilo estas malfacile montri ilin al legantaro. Nun, tamen, per la miraklo de la interreto vi povas transportiĝi al la ĝustaj adresoj kaj vidi mem la evidencon.



La pregejo, St. Petersburg, Florida



La necesejo, St. Petersburg, Florida

Enmetu la sekvan adreson, “515, 4th street south, st petersburg, florida”, kaj serĉklaku. Mustrahu vian flavan amiketon al la kruciĝo inter 4th street south kaj 5th avenue south. Per ĉirkaŭrigardo vi baldaŭ trovos belaspektan katolikan preĝejon, nome “St Mary, Our Lady of Grace”. Rimarku la koloron de la brikoj, la romaneskajn arkojn, la blankajn ornamajn brikojn en la muroj, la okangulan planon, kaj rimarku, sur la pinto de la tegmento, la blankan tureton kun volbeto.

Nu, Johnny Mott, la direktoro de “Sunshine Flying School” (la Aviada Lernejo Sunbrilo) en Sankta Petersburgo, rakontis al mi la jenan. La arkitekto kiu desegnis la preĝejon, kaj kies kompanio konstruis ĝin, estis ano de la paroĥo kaj pia katoliko. Lian nomon, pro respekto, mi ne mencias. Post la fino de la konstruo kaj interna ornamado, kiam ĉiuj eksteraj signoj tipaj de konstrua ejo estis forviŝitaj, kaj la preĝejo estis formale transdonita al la paroĥo, li komencis ricevi pomonatajn partopagojn de la tuta kosto laŭ la konsentita kontrakto. Sed la fina pago ne venis. Li atendis kelkajn monatojn sed ankoraŭ nenio venis. Do li kontaktis la ĉefepiskopon de la diocezo de Sankta Petersburgo por demandi ĝentile kiam venos la mono. La ĉefepiskopo, kies nomon mi ne mencias ĉar mi neniam eksciis ĝin, respondis al nia arkitekto ke la “fina” pago ne venos ĉar tiu estas lia kontribuo, kiel paroĥano, al la kosto de la nova preĝejo. Kvazaŭa 20-a jarcenta dekonaĵo.

Kompreneble la arkitekto koleriĝis, sed li faris nenion, ĉar li sciis ke justo ĉiam venkas. Necesas nur pacienco. Kaj tiel okazis. Post kelkaj jaroj aperis reklamo far la instanco de la urbego Sankta Petersburgo, kiu petis arkitektajn proponojn por nova konstruaĵo. Nia arkitekto tuj ofertis, tute senpage, siajn servojn, sub unu kondiĉo: ke la desegno de la nova konstruaĵo estu nur en liaj manoj. La instanco ne povis rifuzi senkostan kontrakton, do akceptis la proponon senhezite.

Nun, vi, kara leganto, enmetu la sekvan adreson en la serĉskatoleton “320, 2nd ave north east, st petersburg florida”. Trahu vian flavan amiketon al la indikata punkto. Per mustraha ĉirkaŭrigardo vi trovos etan konstruaĵon el brikoj. Tiu ĉi estas la senpaga rezulto de la oferto de nia arkitekto. Notu la koloron de la brikoj, la arkojn de la fenestroj, la blankajn enmurajn ornamaĵojn, la okangulan planon, kaj la blankan tureton sur la tegmentopinto. La simileco inter tiu kaj la paroĥa preĝejo estas frapa. Sed ne trompiĝu, kara leganto, tiu ĉi estas publika necesejo!

Hju RID

La “internaj ideoj” de Esperanto

[Noto de la redaktoro: Ni kun plezuro represas ĉi tie ĉi tiun gravan kontribuon de Gary Mickle al nia daŭranta debato.]

Unu el la plej oftaj stereotipoj pri Esperanto-parolantoj estas tiu, ke ili aŭdace pretendas pri sia lingvo, ke ĝi kapablas plipacigi la homojn kaj eĉ alvenigi daŭran mondan pacon, se oni prenas ĝin kiel universalan duan lingvon por la homaro. Tiu rakonto pri nekredeble naivaj esperantistoj havas, kiel oni devas konfesi, ian bazon en la historiaj faktoj – sed nur iometan. Esperantistoj dum la historio tendencis troigi la valoron de komuna lingvo kiel faktoro de paco kaj bona volo, sed malmultaj, se entute iuj, iam faris la spirhaltigan pretendon, ke Esperanto sola povus elimini ĉiujn militojn. Implikado de Esperanto kun ideologio de “paco” estis iugrade rezulto de pura pragmateco. Ĝi estis pli akceptebla ol aliaj ideologioj en socia movado, kiu bezonis idealisman motivon, ĉirkaŭ kiu homoj povis kolektiĝi, homoj, kiuj tamen tre diferencis inter si pri politikaj kaj religiaj aferoj, kaj inklinis al kverelado pri la maniero, per kiu oni kunmiksi aŭ ne kunmiksi Esperanton kun ili.

Zamenhof kreis la terminon “interna ideo” por signi la ideon, ke Esperanto estu rimedo por antaŭenigi etnan, nacian kaj religian toleradon kaj ankaŭ justajn rilatojn inter lingvaj komunumoj. Zamenhof abomenis la ideon, ke ĝi estas nenio pli ol praktika komunikilo. De pli ol cent jaroj, la plej multaj uzantoj de Esperanto aŭ eksplicite aŭ implicite akceptas la internan ideon tiel, kiel ili mem interpretas ĝin, kaj kelkaj ofte referencas al ĝi.

Zamenhof vortigis la aferon en parolado ĉe la 2-a Universala Kongreso de Esperanto en 1906 tiel: “al laborado por Esperanto instigas nin ... nur la penso pri la sankta, granda kaj grava *ideo*, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*.” Iom poste li priskribis la unuajn esperantistojn jene: “Ĉiuj memoris nur pri la interna *ideo* entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la *korpojn* de la

homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la *cerbojn* de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn *korojn*.” [1]

Estus simplanime malatenti la duecan karakteron de la interna ideo kia ĝi estis origine konceptita. Kvankam ĝia ideo fono estas fundamente universalisma, ĝi rilatigas sin specife – en sia kutima formuliĝo – ankaŭ al etnaj kaj lingvaj komunumoj kaj traktas ilian rilatecon al la temo kiel evidentajon. Ĝi estas do malfermita al partikularismaj reinterpretoj, kiuj emfazas unuavice tiujn komunumojn kaj la laŭsupoze ĝustan manieron bonteni ilin kaj reguli iliajn reciprokajn rilatojn. La ideologia historio de Esperanto povas esti konceptita en signifa grado kiel oscilado inter universalismo kaj partikularismo. La kontraŭdiro inter tiuj du antinomijaj polusoj provokis pli da fundamenta ideologia interkontestado inter esperantistoj ol la kontraŭdiro inter la “dekstro” kaj la “maldekstro”, kiel oni tradicie komprenas ilin. Radikale universalismaj kaj radikale partikularismaj vidpunktoj pri la politika signifo de Esperanto diferencas tiel multe de la tradicia esperantista ideologio, ke plej konvenas rigardi ilin kiel alternativajn (kaj reciproke sin ekskludantajn) internajn ideojn, diferencajn de la norma versio, kiu iras mezan vojon.

Jarosław Tomasiewicz, la ĉefa ideanto de la Nova Dekstro en Pollando kaj laŭŝajne ankaŭ neaktiva esperantisto, faris ĉi tiun observon en artikolo pri esperantistoj-etnistoj: “Eblas distingi du tendencojn en la internacia Esperanto-movado. La unua traktas Esperanton kiel instrumenton por unuigi la homaron. La dua opinias, ke Esperanto devus defendi la diversecon de la mondo, donante al malgrandaj lingvoj kaj kulturoj ŝancon sin defendi kontraŭ tio, ke la lingvoj de grandaj nacioj forvoras ilin.” [2] Tomasiewicz, kun kiu mi politike ne akordas, ŝajne vidis la saman fundamentan ideologian kontraŭdiron inter esperantistoj, kiun mi vidis.

Unuaranga protagonisto de radikala universalismo ĉe esperantistoj estas la laborista Esperanto-movado, aŭ almenaŭ granda parto de ĝi. Ĝi tradicie favoras la ideon, ke Esperanto servu la proletaron kiel ilo por faciligi ĝian memklerigon per rektaj politikaj kontaktoj inter diverslandaj laboristoj, kaj kiel rimedo por liberigi laboristojn el la katenoj de naciisma pensado.

La mala “interna ideo”, la partikularisma, estas historie samgrade grava kiel la proleta. Jam de la 70-aj jaroj ĝi estas laŭmoda, kaj oni foje provas reklami ĝin inter Esperanto-parolantoj kiel modernigitan esprimon de la originala “interna ideo” de Zamenhof. Sed verdire ĝi diferencas signife

disde tiu, ĉar ĝi pivotas ĉirkaŭ la nocio, ke la tutmonda enkonduko de Esperanto helpus konservi la vitalecon kaj eĉ la ekziston mem de etnoj, etnaj lingvoj kaj etnaj identecoj. Kiel unu el la kontraŭuloj de tiu nun preskaŭ ĉie renkontata ideo, mi objetas kontraŭ la ofte farata pretendo, ke ĝi estas simpla korolaro de la zamenhofa “interna ideo”. Mi kredas, ke ĝi konsistigas apartan ideologion, esprimon de io, kion oni diverse nomas “komplementa” aŭ “genra” naciismo (kontraste kun la “ekskluzivaj” naciismoj de apartaj nacioj). En sia moderna formo, tiu ideologio ofte esprimiĝis laŭ maniero, kiu faras ĝin rimarkeble simila al la novdekstra etnoplurismo.

Zamenhof mortis en 1917. Dum sia vivodaŭro li pli kaj pli rezolute malakceptis la naciismon. Li ankaŭ neniam asertis, ke Esperanto iun tagon “savus” etnajn lingvojn kaj etnajn kulturojn de estingiĝo.

En 1914 li respondis al peto aliĝi al nove fondita Tutmonda Esperantista Hebrea Asocio, tiel: “Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero, ĉar laŭ miaj konvinkoj mi estas 'homarano' kaj mi ne povas ligi min kun la celado kaj idealoj de speciala gento aŭ speciala religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron, kiu dividus sin nur laŭ teritorioj, sed ne laŭ gentoj kaj religioj. Estas vero ke la nacionalismo de gentoj premataj – kiel natura sindefenda reago – esta multe pli pardoninda, ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian kaj prezentas eraran rondon da malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute *neŭtrala*. Tio estas la kaŭzo, pro kiu mi malgraŭ la korŝirantaj suferoj de mia gento ne volas ligi min kun hebrea nacionalismo, sed mi volas labori nur por interhoma justeco *absoluta*.” [3]

En 1915, en verko titolita *Post la granda milito* [4], Zamenhof avertis la estontajn arkitektojn de postmilita pac-interkonsento kontraŭ la provo solvi laŭ “justa” maniero etnajn konfliktojn per kontentigo de la teritoriaj pretendoj de diversaj etnaj naciismoj: “... gardu vin, ke la refarado de la karto ne fariĝu la tuta *esenco* de viaj laboroj, ĉar tiam viaj laboroj restus tute senvaloraj”. Lia konkludo estis kaj radikala kaj diametre kontraŭa al la ideologio de etnismo, kiu regas nun en granda parto de la Esperanto-komunumo: “Se vi eĉ farus nenion alian, *se vi nur forigus la gentajn nomojn*

de la landoj (afero tre facile farebla), vi jam farus per tio agon eksterordinare gravan, vi kreus novan eron en la historio de Eŭropo.”

Eble en sia eseo *Esenco kaj estonteco de la ideo de internacia lingvo* [5] (1900) Zamenhof plej klare deklaris sian vidpunkton pri lingvokonservado kaj la lingva estonteco de la homaro: “ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo.” Zamenhof nomis tiujn, kiuj vidas en tia evoluo malfeliĉon, “naciaj ŝovinistoj”. Por Zamenhof la eblo de “kunfluiĝo de la homoj en unu ĉiuhoman popolon” estis, kvankam ne tuj aktualiĝonta afero, almenaŭ legitime pripensinda estonta opcio por la homaro. El la kunteksto evidentas, ke li ne uzis la esprimon “ĉiuhoma popolo” metafore, sed parolis pri mondo sen nacioj kaj sen naciaj lingvoj. Li rilatigis tion al Esperanto, dirante, ke la lingvo internacia “faciligos al la homoj la atingon de tio” - ne trudnecese, sed se la homoj kolektive dezirus ĝin.

La 15-a de decembro 2009 estos la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, kaj oni planas memorindigi tiun eventon. Mi ne atendas, ke la etnemuloj, kiuj dominas en UEA kaj kelkaj aliaj asocioj, eĉ dum momento konsideros omaĝi la konsekvence *universalisman* kaj *kontraŭnaciisman* starpunkton, kiun Zamenhof evoluigis dum sia vivovojo kaj defendis en siaj verkoj. Tiun taskon devas plenumi kritika malplimulto.

Gary MICKLE

Notoj:

[1] Zamenhof, L. L.: parolado en la 2-a Universala Kongreso legebla i.a. en Zamenhof, L. L., *Mi estas homo* (red. A. Korĵenkov), Kaliningrado, Sezonoj, 2006, p. 168-179; enrete i.a. ĉe:

<http://reto.cn/biblioteko/movado/zamenhof/paroladoj/uk2.htm>

[2] Tomasiewicz, Jarosław: "Etnizm zamiast szowinizmu..." en *Zakorzenie* n-ro 1 (3), 1999; rete legebla ĉe: <http://zakorzenie.most.org.pl/za3/04.htm>

[3] Zamenhof, L. L.: letero al Heller legebla i.a. en Zamenhof, L. L., *Mi estas homo*, p. 217-218

[4] Zamenhof, L. L.: "Post la granda milito (Alvoko al la diplomatoj)" legebla i.a. en Zamenhof, L. L., *Mi estas homo*, p. 229-233

[5] Zamenhof, L. L.: *Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia* legebla i.a. rete ĉe <http://i-espero.info/files/elibroj/eo%20-%20zamenhof,%20l.l.%20-%20esenco%20kaj%20estonteco%20de%20la%20lingvo%20internacia.pdf>

106a Skota Kongreso de Esperanto

en *The King's Arms Hotel, High Street, Lockerbie, Dumfries-shire, Skotlando*

10a ĝis 13a de junio 2011

Bonvenon al la plej alta kongresnumero en Esperantio ! La kongreso organizita ĉiujare de post 1906 de Esperanto-Asocio de Skotlando okazos en 2011 en **Lockerbie**, agrabla loko en la histoririĉa regiono de suda Skotlando, la unua urbo kiun oni renkontas enirante Skotlandon per la ĉefaj ŝoseo aŭ fervojlinio inter Anglio kaj Glasgovo. La kongresurbo aldone atingeblas tra la ĉefaj skotaj flughavenoj ĉe Glasgovo, Edinburgo aŭ Prestwick, ĉu aŭte, ĉu fervoje, ĉu buse.

La urbo estas mondfama de post la tragedio de 1988, sed Lockerbie havas longan historion. Certe ĝi ekzistis de post la periodo de vikinga influo en ĉi tiu regiono de Skotlando ekde la jaro 900 de nia epoko. La nomo signifas "la vilaĝo de Loki" en la antikva norena lingvo, kaj ĝi unue menciatas en skribaj kronikoj kiel **Lokardebi** en 1306. Romiaepokaj restaĵoj tuj okcidente de la urbo sugestas, ke ĝiaj originoj estas tamen multe pli fruaj. Ekde la 18a jarcento komenciĝis granda kresko de la signifeco de la urbo kiel komunikad-centro, unue sur la ĉefa kaleŝvojo inter Londono kaj Glasgovo, kaj pli poste kiel fervoja halto sur tiu grava linio. Alia potenca elemento en la ekonomio de Lockerbie ankaŭ de post tiu tempo estis kiel merkatejo por ŝafidoj. En suna tago, la ruĝaj ŝtonoj de la imponaj 19a-jarcentaj konstruaĵoj de la centro de la urbo buntigas la aspekton de la centro de la urbo, kaj ĉirkaŭe estas aparte bela pejzaĝo.

Por regali al la ĉeestantoj en Esperanto, la kongres-programo enhavas divers-specajn erojn, seriozajn, leĝerajn, edukajn aŭ simple sociumecajn, kaj interalie informos kaj distros nin nia gastpreleganto **Gražina Opulskienė** el Litovio. En la apuda regiono estas multaj vizitindaĵoj, kaj ni faros ekskurson sabat-posttagmeze al la antaŭa hejmo de **Thomas Carlyle**, fama 19a-jarcenta historiisto, filozofo, literaturisto kaj saĝulo apud Ecclefechan, kaj al la vilaĝo **Gretna Green** tuj apud la landlimo kun Anglio, fama kiel geedziĝloko por forkurintaj paroj. En la dimanĉo posttagmeze okazos gvidata pieda rondiro de la urbo Lockerbie mem, kaj se eblas, vizito de la preĝejo konstruita de ukrainaj militkaptitoj apud la urbo. En la lundo estos tuttaga ekskurso por tiuj kiuj volas iomete plikonatiĝi kun la aliaj vizitindaĵoj de la regiono, aŭ eĉ unuj kun la aliaj.

La Esperanto-Asocio de Skotlando varme bonvenigas vin ĉiujn al nia 106a kongreso ! (vidu aliĝilon apude)

Sendu vian aliĝilon kun via pago, preferinde antaŭ la mezo de majo 2011 al:
Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, MOTHERWELL, ML1 3AP, Skotlando
rete: jean.bisset@yahoo.co.uk tel.: +44 (0) 1698 263 199

Aliĝilo

Nomoj:
Adreso:
Urbo:
Lando:
Telefono:
Retpoŝto:

NOTU, KE LA PREZOJ NE INKLUZIVAS LOGADON. Estas multaj eblecoj en kaj apud Lockerbie, inkluzive la kongresejon mem (tel. +44 (0) 1576 202410, rete: <http://www.kingsarmshotel.co.uk/>). Aliĝintoj ricevos detalojn. La kongreskotizo inkluzivas 4 manĝojn: vespermanĝo vendredon, leĝera tagmanĝo kaj vespermanĝo sabaton, kaj tagmanĝo dimanĉon.

Bv. hoketi aŭ enmeti la mendatan kvanton

Tuta kongreso inkluzive 4 manĝojn (£65/€75)

Ekskurso sabaton ptm. (ebla modesta kosto anoncota)

Tuttaga ekskurso lundon (modesta kosto anoncota)

Parttempa kotizo (bv. diskuti prezon kun la kongresorganizanto)

Sub 16 j. senpage. Gejunuloj sub 26 j. rajtas peti subvencion de NoJEF (<http://www.esperanto-gb.org/nojef/index.htm>). Se vi por vizo bezonas invitleteron, bv. peti, sed ĝi estos sendata nur post pago de la kotizo.

Mi pagas: ĉeke / al UEA-konto *eask-l* (forstreku)

Vegetarano? jes / ne / ne gravas (forstreku)

Mi aldone inkluzivas donacon de Totala sumo

(Ĉekoj estu pageblaj al „**Scottish Esperanto Association**“)

Alia kopio de ĉi aliĝilo troviĝas rete:

<http://www.skotlando.org/fileadmin/esperanto/aligxiloj/EES16alighilo2011.pdf>
aŭ aliĝu kaj pagu rekte ĉe <http://www.esperanto-gb/sk>



Kalendaro

-
8. - 10. aprilo 2011: 92-a Brita Kongreso de Esperanto en Eastbourne, Sussex, Anglio. Kongresa temo: Lumturoj, lumuloj kaj lumaĵoj. Info: Esperanto-Asocio de Britio. Rete: http://www.esperanto-gb.org/eab/eab_events/bk2011_payment.htm.
-
29. aprilo - 9. majo 2011: 23-a Aroma Jalto en Jalto, Ukrainio. E-festivalo kies celo estas plialtigi lingvonivelon kaj konatiĝi kun belega naturo de Krimeo. Info: Volodimir Hordijenko, p/k35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. Rete: volodomir@ukr.net
-
- 20 - 26. aprilo 2011: IJF - Itala Junulara Festivalo en Pornassio, Italio. La ĉefa aranĝo de Itala E-junularo okazos en la ĉemara regiono Liguria. Info.: Itala Esp-a Junularo iej@esperanto.it.
-
10. - 13. junio 2011: 106-a Skota kaj Internacia Kongreso de Esperanto en The King's Arms Hotel, High Street, Lockerbie, Dumfriesshire. Info: Jean Bisset, 47 Airbles Crescent, MOTHERWELL, ML1 3AP, Skotlando. Tel.: +44 (0) 1698 263 199. Rete: jean.bisset@yahoo.co.uk. La plej alta kongresnumero en Esperantio! (Vidu p. 42-43).
-
29. junio - 5. julio 2011: 1-a Internacia Esperanto-Semajno, IES-1 en ĉefurbo Erevano kaj en arbara ripozejo Tsakhkadzor, Armenio. Venu kaj malkovru la antikvan Armenion kaj monton Ararato. Info: ies-1.armenio@area.am aŭ susanna.baghdasaryan@yahoo.com.
-
9. - 16. julio 2011: 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET- 47) en Agrikultura teknikumo, Priekuļi, Latvio (7 km de Cēsis, 87 km de Riga). Info: Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio. Rete: margarita.zelve@gmail.com. Tel.: + 371 26407174
-
- 23 - 30. julio 2011: 96-a Universala Kongreso de Esperanto, UK en Kopenhago, Danio. Info: <http://www.96uk-kopenhago.dk>, <http://www.uea.org/kongresoj/>
-
30. julio - 6. aŭgusto 2011: 84-a SAT-Kongreso en Sarajevo, Bosnio-Hercegovino. Info: 84-a SAT-Kongreso, Kralja Tvrtka 19, Ba-71000 Sarajevo, Bosnio kaj Hercegovino. Rete: satkongreso@esperanto.ba aŭ <http://www.satesperanto.org/2-a-kongresa-bulteno.html>. Tel/fakso: +387-33-205487.
-
- 8 - 15. aŭgusto 2011: Junulara festo en Grezijono-Kastelo, Francio. Vinilkosmo disponebligis ĉiutagajn koncertojn dum la tuta semajno, en neforgesebla etoso kun densa vespera programo. Tage ekskursoj kaj prelegoj kaj eĉ banado en la kastela lageto por la plej kuraĝaj homoj! Info: alekcxjo@gmail.com kaj bjokac@gmail.com.
-
15. - 19. aŭgusto 2011: 51-a 'Somera Festivalo' - Kunludu kaj kunstudu en Barlaston (apud Stoke-on-Trent, Anglio). Du-nivela kursaro kun la eblo turismi. Info: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE. Tel.: +44-(0)1782-372141. Rete: eab@esperanto-gb.org.
-
20. - 27. aŭgusto 2011: 78-a Itala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio. La kongreso 2011 okazos en Torino, la unua ĉefurbo de Italio, jubilee en la 150a datreveno de la nacia unuiĝo. Info: Itala Esperanto-Federacio itala.kongreso@gmail.com.
-
21. - 23. oktobro 2011: 'Course-You-Can', Barlaston (apud Stoke-on-Trent, Anglio). Kurso ĉefe por anglalingvaj komencantoj. Samtempe 'Drondo' - E-lingva diskutrondo. Info: Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, DT12 9DE. Tel.: +44-(0)1782-372141. Rete: eab@esperanto-gb.org.
-